# LA KORTEGA CIRKULERO

de la 74a Universala Kongreso de Esperanto, Brajtono, Anglujo. 1989

Dimanĉon, la 30an de julio

No 1


# UEA HAVAS NOVAN PREZIDANTON

JOHN WELLS, profesoro pri fonetiko en la Universitato de Londono, estas la nova prezidanto de Universala Esperanto-Asocio.

Lin hieraŭ elektis la nova komitato de UEA. En sekreta baloto profesoro Wells ricevis 40 porajn voĉojn. La alia kandidato, sinjoro Yoshimi Umeda, ricevis 22 voĉojn. La nova prezidanto transprenos la gvidadon de la Asocio post la Unua Ĝenerala Kunsido kaj la senŝarĝigo de la ĝisnuna estraro.

Profesoro Wells estas konata fakulo pri la diversaj prononcoj de la angla lingvo, kaj li jam ofte aperis en la britaj radio kaj televido. Li estas aŭtoro de pluraj libroj, inkluzive de la alte taksata "Akĉentoj de la angla" kaj, plej laste, la "Prononca vortaro Longman". En la Esperanto-movado li verŝajne estas plej renoma pro sia vaste uzata Esperanta-angla vortaro en la serio "Teach Yourself".

John Wells prezidas jam de longe la Londonan Esperanto-Klubon, kaj estas ankaŭ prezidanto de la Loka Kongresa Komitato ĉi tie en Brajtono. Nome de ĉiuj kongresanoj ni kore gratulas lin pri lia elektiĝo kaj deziras al li fruktodonan laboron en la venontaj 3 jaroj.

## LA UNUA KURIERO - SED KIAL LA NOMO?

Jen la unua numero de la kongresa kuriero. Sed ĉu ni ĉiuj subite iĝis rojalistoj!?! Kial ĉi-jare la kuriero nomiĝas Kortega Cirkulero?

### REĜA HISTORIO

Nu, ni ne volas, ke vi forgesu pri la reĝa historio de la kongresurbo. Fine de la 18a jarcento la brita kronprinco kaj regento (poste reĝo Georgo IV) enamiĝis al la beleco kaj trankvilo de Brajtono, kiu estis tiutempe nur malgrava apudmara urbeto. Li konstruigis fantazian somerpalacon - la Brajtonan Pavilonon - kaj en la varma vetero venigis el Londono sian tutan kortegon. Okazis laborkunvenoj de la registaro; distraj spektakloj por la nobeloj; bankedoj por diplomatoj; kaj brilaj baloj por la pinta mondumo de la lando. Pri ĉio ĉi raportis LA KORTEGA CIRKULERO: avide legata ĉiutaga bulteno de la reĝa familio, kiu ankoraŭ hodiaŭ aperadas en la ĵurnalo The Times.

### NENIO EBLUS SEN GEORGO

Efektive, sen la interesiĝo de la kronprinco pri Brajtono ĝi ne estus atinginta sian nunan gravon kiel konferenca urbo. Tio signifas, ke nur dank' al Georgo ni nun kongresas ĉi tie. Ni, same kiel la princo siatempe, laboros en kunvenoj, distriĝos en spektakloj, bankedos kaj balos. Evidente, same kiel la princo kaj lia kortego siatempe, vi do devus ĉiutage legi atente la Kortegan Cirkuleron!!!

# IMPONA LANĈO

## KIE PAROLADIS ZAMENHOF

Pli ol 200 kongresanoj, honoraj gastoj kaj ĵurnalistoj partoprenis la ceremonian lanĉon de la 74a Universala Kongreso de Esperanto. La lanĉo okazis en la posttagmezo de vendredo, 28 julio, en la impona halego Guildhall (Gildohalo), la urbdomo de la antikva civito Londono. Tie antaŭ 82 jaroj, post la 3a Universala Kongreso en 1907, Zamenhof faris faman paroladon, en kiu li pledis por nova koncepto de la patriotismo, kiu rekonus la kunfratecon de ĉiuj homoj.

La lanĉo komenciĝis per laŭtlegaĵo el tiu zamenhofa parolado, post kio Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, bonvenigis nome de la Asocio. John Wells bonvenigis en la nomo de la Londona Esperanto-Klubo kaj la tuta brita movado, kaj liajn vortojn sekvis saluto de Lordo Rugby nome de la britaj parlamentanoj/subtenantoj de Esperanto.

### TONKIN FESTPAROLAS

La festparolado de profesoro Tonkin reportis la aŭskultantojn al la revo de Zamenhof pri mondo, kie eblus ami sian patrion, sen ke tio signifu malestimadon de aliaj popoloj. Tiu sama revo troviĝas en la temo de nia kongreso: Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado. Por realigi la revon de Zamenhof necesas revolucio emocia kaj intelekta. Sed la internacia lingvo mem montras, ke tia revolucio estas efektivigebla.

En 1907 Esperanto apenaŭ estis 20 jarojn aĝa: nura potencialo malmulte evoluinta. Hodiaŭ ĝi estas plenkreska lingvo, dank' al la laborado kaj sindediĉo de la esperantistoj. La internacia lingvo transvivis la ekstremajn kruelojn de la lastaj ok jardekoj. Kiuj do pravis en 1907? La skeptikuloj, kiuj aŭdis la Guildhall-paroladon de Zamenhof kaj malkredis, ke liaj ideoj estas realigeblaj? Tute kontraŭe. Pravis la esperantistoj.

### AKCEPTIĜAS IDEOJ DE ZAMENHOF

Efektive, en 1989 la ideoj de Zamenhof pri patriotismo, kiu estu samtempe tutmondismo, finfine ne plu sonas tiel strangaj. Sed respekto al aliaj popoloj ankoraŭ ne kondukis ĝis kompreno pri la lingva problemo en la mondo. Oni jam ofte aŭdas, ke tiu problemo estas per la angla lingvo finsolvita. Sed kiel indas agnoski la egalecon de ĉiuj landoj nur je kondiĉo, ke oni akceptu la anglan kiel mondlingvon? Tio estas anstataŭigi unu specon de koloniismo per alia.

82 jarojn post la parolado de Zamenhof ni do devas plu donadi nin al la disvastigo de lia idealo. Li pledis por amo al patrio, kiu ne koliziu kun amo al ĉiuj popoloj. Ni pledu simile por amo al la propra etna lingvo, kiu tamen ne implicu malrespekton al la lingvoj de aliaj.

Ni konfirmu nian kredon je la neŭtraleco de Esperanto, kaj redediĉu nin al la lukto por sendiskrimina komunikado.

### PRINCO EDWARD SALUTAS

Post la parolado de profesoro Tonkin salutis la diplomataj reprezentantoj: interalie, por Kubo kun kora invito al ĉiuj esperantistoj partopreni la 75an Universalan Kongreson en Havano venontan jaron. Profesoro Wells transdonis al la kunveno skribajn bondezirojn interalie de Lia Reĝa Moŝto Princo Edward (plej juna filo de la reĝino), kardinalo Hume, ĉefepiskopo Runcie kaj Alan Ayckbourn, kies teatraĵo estos prezentita en la kongreso.

La ceremonia lanĉo finiĝis per deklamado en Esperanto (Simo Milojević) kaj la angla (Mark Fettes) de la speciale verkita poemo de William Auld, kiun vi povas legi sur paĝo 19 de la Kongresa Libro.

Post la ceremonio okazis akcepto en Guildhall por ĉiuj partoprenintoj.

# LORDO WILSON –

## NIA ALTA PROTEKTANTO

La alta protektanto de la 74a Universala Kongreso estas Lordo Wilson de Rievaulx. Li estas diplomito de la Universitato de Oksfordo pri filozofio, politiko kaj ekonomiko. Li fariĝis universitata lekcisto pri ekonomiko en 1937 kaj elektiĝis en la britan parlamenton kiel deputito por la laborista (socialisma) partio en 1945. Lordo Wilson komencis sian registaran karieron tuj post sia elektiĝo, kaj baldaŭ havis respondecon pri la en- kaj eksterlanda komerco. Li fariĝis prezidanto de la estraro de la laborista partio en 1961 kaj gvidanto de la partio en 1963. Li estis ĉefministro de Britio ekde 1964 ĝis 1970, kaj denove de 1974 ĝis 1976. Post libervola retiriĝo el la registaro li donis sin al oficiala pritakso pri la funkciado de Londono kiel monda financa centro. De 1976 ĝis 1985 li prezidis la Reĝan Ŝekspiran Kompanion, kaj estas ankaŭ honora prezidanto de Asocio Britio-Sovetunio. Lordo Wilson eklernis Esperanton en sia junaĝo, kaj plurfoje esprimis en la tutlandaj amaskomunikiloj sian subtenon al la celoj de la Esperanto-movado. Kun granda ĝojo ni akceptas lian altan protekton.

## TEATRAĴAJ BILETOJ

GRAVE!! Se vi deziras ĉeesti la teatraĵon "Kato sur varma ladotegmento" aŭ la teatraĵon "La eta princo", atentu, ke necesas preni senpagan bileton ĉe la informejo por certigi al vi sidlokon. Tion vi do faru kiel eble plej frue. Oni disdonas la biletojn ekde hodiaŭ.

### "ANNE FRANK NE ESTAS DE HIERAŬ"

Sprita kaj kortuŝa rakonto de Mies Bouhuys, ne nur por infanoj. Facile legebla pro kapta esperantigo de Nora Bartels kaj grandlitera eldono. Punde aĉetebla en la kongresa libroservo. Nederlanda prezo: 15 guldenoj.

(Pagita anonceto.)

# TAGO DE LA LERNEJO

Ĉi tiu programero bedaŭrinde elfalis el la programo en la Kongresa Libro. Ĝi okazos en salono Zamenhof ekde 15.00 en mardo.

La temo de la ILEI-Konferenco estas "Motivado". Tio ŝajnas taŭga ankaŭ por la Tago de la Lernejo, ĉar motivado ludas tre fortan rolon en ajnspeca lernado. Tion pruvas la fakto ke homoj pretas elspezi grandegan energion kaj akiri eĉ perverse malfacilajn lingvojn, se la financaj, karieraj aŭ aliaj motivadoj estas sufiĉaj. Kontraŭe, instruado plene oficiala kaj devige intensa povas alporti mizerajn rezultojn, se la cirkonstancoj de ĝia devigo kondukas al negativa motivado: ekzemple la rusa en Hungario au, almenaŭ pli frue, la angla en Japanio.

## OFICIALIGO FOJE SUFOKAS

Ni devas konstati, ke la nivelo de lerneja instruado de Esperanto estas tre varia kaj ĝenerale modesta; tio signife ligiĝas al motivado. Unuflanke ni bedaŭras la mankon de oficialeco kaj seriozeco. Aliflanke troa oficialigo povas forrabi multon el la potenciala motivado: ĝi iĝas "nur ankoraŭ unu peza studotemo".

## SUKCESOSENTO MOTIVAS

Necesas inventari tiujn unikajn facetojn de Esperanto, kiujn ni povas uzi por entuziasmigi lernantojn, sed ankaŭ eviti lecionojn, kiuj konsistas el nur leĝeraj "motivadaj" agadoj, tiel ke vera komunika kapablo en la lingvo neniam elformiĝas. Konstatendas, ke la evoluo de tiu kapablo, eĉ se pene akirita per multa kaj sistema laboro, estas en si mem tre forta motivado: sukcesosento pri ekrego de lingvo efektive uzebla.

Dum la Tago de la Lernejo deko da ILEIanoj intervenos pri tiu temo, kaj teorie kaj praktike. (Stefan MacGill.)

# Internaciaj ekzamenoj

La internaciaj ekzamenoj de UEA kaj ILEI estos proponataj je elementa kaj meza niveloj dum ĉi tiu kongreso. Kandidatoj anoncu sin fine de la ILEI-kunsido en lundo (salono Brownlee tagmeze) aŭ en mardo je 14.00 en salono Goldsmith. Tie okazos ne la skriba ekzameno, kiel indikite en la Kongresa Libro, sed registrado kaj la gramatika antaŭtesto (meznivele 50 minutoj, elementa 40 minutoj). La trihora skriba parto de la ekzameno okazos ĵaŭdon je 11.00 en salono Rhodes, kaj sekvos ĝin posttagmeze la parola parto, en kiu la kandidatoj unuope ekzameniĝos.

## NOVA KLARIGA LIBRETO

La ekzamenkotizo varias laŭlande (kiel la kotizoj de UEA) sed la maksimumo estas 40 nederlandaj guldenoj. Ĵus lanĉita 36paĝa libreto klarigas la celojn, postulojn kaj regularon de la ekzamenoj; kaj krome prezentas du specimenajn ekzamentestojn, unu elementan kaj unu mezan, kiuj ebligas al interesatoj juĝi, ĉu ili havas la necesan nivelon. La libreto kostas 1,80 pundojn en la kongresa libroservo.



# SUBTENU VIAN KURIERON!

En vasta kongreso estas foje malfacile ekscii pri gravaj okazintaĵoj. Ĉiam do prenu kaj legu la Kortegan Cirkuleron, kiu celas teni vin informata pri la aktualaj eventoj. Ĝi portos ankaŭ informojn pri programŝanĝoj kaj, se la spaco sufiĉos, mallongajn anoncetojn de kongresanoj.

Bonvolu transdoni ĉiun materialon por la Kortega Cirkulero al la kongresa informejo, aŭ rekte al la redaktoro. Ni aparte petas al la gvidintoj de kunvenoj, ke ili liveru koncizan raporton pri sia kunveno TUJ post ĝia finiĝo. Estus tre helpe, cetere - egale por la gazetara servo kiel por la kongresa kuriero - se prelegontoj anticipe liverus resumon pri sia prelego al la redakcio. Tio ebligos al ni poste raporti pri la prelego kun maksimuma akurateco. Antaŭdankon!

## LA KULPULOJ

La Kortegan Cirkuleron redaktas Ian Jackson nome de la Loka Kongresa Komitato. Li siatempe redaktis la kongresan kurieron de la 61a Universala Kongreso en 1976 (Ateno), kaj poste estis redaktoro de la novaĵletero de la brita junulara asocio, de la gazeto Koncize kaj de la TEJO-paĝo en la revuo Esperanto.

Pri la teknika pretigo de la Kortega Cirkulero kunlaboras Peter Oliver, bultenisto de la Londona Esperanto-Klubo.

# KATO SUR VARMA LADOTEGMENTO

Okazos du prezentoj de ĉi tiu teatraĵo. La komencohoroj indikitaj en la Kongresa Libro estas ĝustaj, sed la teatraĵo daŭras 2½ horojn (inkluzive de la interakta paŭzo). La unua prezento do okazos en lundo ekde 16.30 ĝis 19.00. La dua prezento okazos en mardo ekde 15.30 ĝis 18.00.

## NE FORGESU PRENI BILETON

Elektu, kiun prezenton vi deziras ĉeesti, kaj prenu senpagan bileton ĉe la kongresa informejo.

## PROGRAMBROŜURO AĈETEBLA

Eblos aĉeti programbroŝuron pri la teatraĵo kaj la teatrogrupo "Kia koincido" antaŭ la prezentoj kaj en la paŭzoj.

# AIS EN BJALISTOKO

*AIS informos vendredon, 15:30 h en salono Lapenna:*

**Centro Zamenhof ekkonstruota 1990 en Bialystok**

Kondiĉe ke tion kaj la koncernataj polaj ministerioj kaj la senato de AIS permesas, la konstrulaboroj por la Centro Zamenhof jam komenciĝos frue en 1990.

La vicvojevodo de Bialystok, inĝ. Slezak, elektita por la demokrata partio en la novan parlamenton surbaze de programo enhavanta i.a. la promeson „altiri filion de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino al Bialystok", subskribis pri tio la 23an de julio interkonsenton kun reprezentantoj de AIS. La antaŭan tagon jam ĉiuj ses Bialistokaj universitatecaj klerig- kaj esplorejoj estis deklarintaj per siaj reprezentantoj sian pretecon kunlabori kun AIS.

Kiel unuan tranĉon de la estonata Centro Zamenhof AIS konstruigos al si „Akademidomon" en la formo de hotelo, en kiu troviĝos prelegejoj por la daŭra ĉiterena laboro de AIS. Subtenaj membroj kaj apartenantoj de la Scienca Sektoro de AIS rajtas fariĝi kuninvestantoj kaj akiri specialajn uzadrajtojn (kaj eĉ profiton). Eventualaj interesitoj tuj informiĝu kaj baldaŭ aliĝu, ĉar jam en la februaro 1990 okazos en la Teknika Universitato de Bialystok, kiu intertempe havigas al AIS la necesajn ejojn, la unua tiea studadsesio de AIS cele la starigon de la Bialistoka filio, kiu plejmalfrue ekde septembro 1990 tie regule laboros.

Por ricevi pluan informon bv. veni en la salonon Lapenna vendredon de la 15:30 ĝis la 17:00 h al la sinprezentado de AIS.

OProf.Dr.H.Frank
Prezidanto de AIS

# Atentu la trafikon!

Okazis hieraŭ antaŭ la kongresejo bedaŭrinda akcidento, kiam kongresano, kiu ne kutimis al la brita regulo veturi maldekstre, koliziis kun nerimarkita aŭto. Feliĉe rompiĝis neniu osto kaj restado en la hospitalo ne necesis. Ni tamen petas al ĉiuj kongresanoj el landoj, kie oni veturas dekstraflanke, ke ili tre atentu, transpaŝante la straton, ĝis ili kutimiĝos al la brita sistemo.

## SONBENDISTO SERĈAS HELPON

Unuafoje multaj el la prelegoj kaj distraĵoj en la kongreso estos sonbende registritaj. Mi intencas registri pli ol 20 erojn kaj vendi sonbendojn antaŭ la fino de la semajno. Mi havas maŝinojn por registri kaj redakti, kopii kaj komputile administri. Sed mi havas nur du manojn! Ĉu vi estus preta helpi? Eĉ helpo de nur kelkaj horoj estus bonvena. Se vi interesiĝas, bonvolu kontakti min per la mesaĝa tabulo. Mi estas Ivor Hueting kaj havas kongresnumeron 1019.

# KURSO PRI TRADUKADO

La projekto pri perkomputila tradukado DLT de la nederlanda programarentrepreno BSO kaj KULTURA CENTRO ESPERANTISTA en Svislando komune organizas kurson pri faka tradukado al Esperanto. La kurso daŭros 3 plenajn labortagojn (vendredo - dimanĉo) kaj okazos en La Chaux-de-Fonds, Svislando, tre verŝajne en januaro 1990.

Interesiĝantoj bonvolu sin turni al:

Kultura Centro Esperantista
Pf. 779
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Svislando

Tel. +41 39 26 74 07

# PARIZA FESTIVALO

La 6a Internacia Kultura Esperanto-Festivalo okazos la 18an kaj 19an de novembro 1989 en Issy-les-Moulineaux proksime al la urbocentro de Parizo.

La programo antaŭvidas kanzonojn de Ĵak Le Puil kaj Jerzy Handzlik; teatraĵon "Kunveno de birdoj" en prezento de Studenta Esperanto-Teatro de Zagreb; literaturan forumon pri la nuntempa Esperanto-literaturo; ankoraŭ unu teatraĵon anoncotan; kabaredon; kaj kantojn kun JEFO kaj Roman Bura.

Se vi ne havas aliĝilon, petu ĝin, skribante al Daniel Doye, 169 Avenue de Choisy, F-75013 Paris, Francio.

# 500 GEJUNULOJ EN IJK

La 45a Internacia Junulara Kongreso okazis en Kerkrade en sudorienta Nederlando en la tagoj antaŭ la UK. Partoprenis proksimume 500 homoj el ĉirkaŭ 35 landoj. La kongresan temon "transporto" oni traktis en diversaj prelegoj, kaj okazis ankaŭ multaj ekster la temo laborgrupoj en programo, kiu estis ĉi-jare aparte riĉa. Detala raporto aperos poste en la revuo Esperanto. Oni elektis novan estraron de TEJO por la periodo 1989-91: Jan Koszmaluk, prezidanto; Yves Bellefeuille, vicprezidanto; Louise Frith, ĝenerala sekretario; Hardo Burgignon, kasisto; Torsten Bendias, Saskia Ideserda kaj Claude Rouget, estraranoj. Aldone, apartaj komisiitoj estas Stella Lindblom (landa agado), Milan Ivan (kulturo), Rob Keetlaer kaj Johan Pachter (faka agado), Thomas Pusch (varbado).

TEJO decidis okazigi la venontjaran IJK en Kubo. Por aliaj novaĵoj pri la agado de TEJO, nepre ĉeestu la kunvenon "TEJO sin prezentas" en salono Lapenna, ĵaŭdon je 11.00.

# D-RO FERENCZY: AKCIDENTO

Kiuj vidis mian akcidenton en Rotterdam okaze de la Universala Kongreso en 1988?

La 26an de julio 1988 je 13.00 en la memserva restoracio NORDZEE (Lijnbaan 81) mi suferis akcidenton pro la montrofenestra vitro. Mi petas tiujn esperantistojn, kiuj vidis mian akcidenton kaj nun ĉeestas en Brajtono, ke ili bonvolu kontakti min pere de la mesaĝa tabulo. Koran dankon!

D-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA, kongresa numero 97.

LA KORTEGA CIRKULERO

de la 74a Universala Kongreso de Esperanto, Brajtono, Anglujo. 1989

Lundon, la 31an de julio

No 2

# TONKIN ADIAŬAS

Humphrey Tonkin hierau gvidis sian lastan solenan inauguron kiel prezidanto de UEA.

Oni formale malfermis la 74an Universalan Kongreson, kun helpo de la livrea anoncisto de Brajtono, antaŭ pli ol 2000 kongresanoj en salono Zamenhof. John Wells bonvenigis al la podio la urbestron, kiun profesoro Tonkin dankis pro liaj sinceraj salutvortoj per ekzemplero de la laste aperinta verko Gazeloj de Hafezo. La ĉeestantoj aŭdis la salutajn mesaĝojn de nia alta protektanto, la antaŭa brita ĉefministro Lordo Wilson; kaj de Federico Major, ĝenerala direktoro de Unesko.

En sia adiaŭa festparolado, Humphrey Tonkin rerigardis al la 9 jaroj (1974-80 kaj 1986-9), dum kiuj li prezidis la Asocion. Li dekomence celis emfazi la unuecon kaj la kontinuecon de la movado; kaj la kolektivan respondecon de ĉiuj esperantistoj evoluigi kaj disvastigi la lingvon. Lia parolado ne lasis dubon, ke Esperanto jam longe progresis post la tempo de Zamenhof; sed la mondo dume ŝanĝis sin. La teknikaj faciligoj al internacia komunikado ĉiam plimultiĝas, kaj ĉiam pli da homoj sukcesas certagradan interkompreniĝon per la angla lingvo. Ni devus do akcepti la defion kreskigi per Esperanto la kvaliton de la komunikado: Esperanto estos vaste parolata nur tiam, kiam ni konvinkos la mondon, ke edukado al internacia kunvivado nepre postulas neŭtralan lingvan fundamenton. Jen la tasko nun antaŭ ni!

## WANDEL HONORITA

La komitato de TEJO antaŭ kelkaj tagoj elektis Amri Wandel kiel honoran prezidanton de la junulara sekcio de UEA.

Amri estas fizikisto en la scienca instituto Weizmann, Israelo. Li estas prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo, komitatano de UEA ekde 1983, kaj aktivas en la movado jam de 1974. Li estis prezidanto de TEJO ekde 1981 ĝis 1983, enirinte ĝian estraron en 1977. Lia plej elstara kontribuo al TEJO estis veki pli altan konscion pri la tutmondeco de la junulara movado. Li forte subtenis okazigon de la 37a Internacia Junulara Kongreso en Meksiko, iniciatis la inviton gastigi la 42an IJK en Israelo, kaj ludis nepran kuraĝigan rolon en la lanĉo de la nun ĉiujaraj seminarioj japanaj-koreaj.

Gratulon, Amri!

## NI NE ŜANĜOS ALFABETON

52 personoj ĉeestis la kunvenon de la Esperantista Komputila Klubo. Post enkondukaj vortoj de Arturo Sly pri la pozicio de la angla lingvo en komputado sekvis vigla diskuto pri uzo de komputiloj kun diverslingvaj alfabetoj. Estis ĝenerale konsentite, ke Esperanto ne ŝanĝu sian alfabeton, sed ke la komputiloj ĉiuokaze moviĝas al solvado de tiaj problemoj.


Estis decidite aranĝi plian kunvenon de la pli teknikaj anoj por diskuti estontan kunlaboradon.

# Koncertos TEAM'

Merkredon je 20.00, kadre de la Junulara Vespero, okazos en salono Zamenhof koncerto de la rokmuzika grupo TEAM'.

Temas pri la plej populara slovaka grupo, kies nacilingvaj diskoj vendiĝas centmile en Ĉeĥoslovakio kaj kies kantojn oni ĉiutage aŭdas en radio aŭ vidas en televido. La grupo komencis okupiĝi pri Esperanto jam je sia naskiĝo; nun, kiel furora grupo, ĝi faras grandan informadon pri la internacia lingvo.

Antaŭ kelkaj semajnoj la kooperativo Literatura Foiro eldonis kasedon kun la plej sukcesaj kantoj de TEAM' sub la nomo "ORA TEAM'". La kasedo (kune kun koloraj afiŝoj kaj nacilingva versio de la disko) estas aĉetebla en la kongresa libroservo. (Stano Marček.)



# BALU KAJTE

Lundon vespere je 20.00, tuj post la Bankedo, okazos en salono Zamenhof la Balo! En agrable festa medio, ĉe esperantista muziko, vi havos la eblecon danci, babili kun malnovaj kaj freŝaj amikoj kaj ĝui la internacian muzikan etoson.

La programon gvidos Stano Marček, manaĝero de la rokmuzika grupo TEAM'.

El la programo menciindas prezento de la UNUA KOMPAKTA DISKO aperinta en Esperanto, produktita de la nederlanda grupo KAJTO, kiu gaste kantos kelkajn pecojn kaj instruos al la ĉeestantoj interesan dancon.

Paralele kun la Balo, en apuda salono (Grabowski), okazos la Junulara Balo.




# UK TRA LA ETERO

Esperanta amatora radiostacio funkcias en la kongresejo kun la voksigno GBØUKE. Se vi deziras viziti la stacion, aŭ eĉ partopreni en la dissendoj, petu detalojn ĉe la kongresa informejo. Vizitoj prefere okazu posttagmeze.

La radiostacio jam starigis kontakton kun radio-amatoroj en Britio (multaj), Bulgario, FR Germanio kaj Pollando. Ankaŭ kun la prezidanto de ILERA (Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-amatoroj), kiu loĝas en Siberio je distanco de ĉirkaŭ 8000 kilometroj!

ATENTON, ILERAanoj!

La staciestro urĝe volas kontakti vin por organizi ILERA-kunvenon, por plibonigi la funkciadon de la radiostacio, kaj (plej agrable!) por inviti vin al sia hejmo en iu vespero dum la kongreso.

LA KORTEGA CIRKULERO

de la 74a Universala Kongreso de Esperanto, Brajtono, Anglujo. 1989

Mardon, la 1an de aŭgusto **No 3**

# Tago de la paco

Ĵaŭdo estas la Tago de la Paco, kaj la pacokunveno okazos en salono Zamenhof de 10.00 ĝis 17.00, kun lunĉa paŭzo.

La urbestro de Brajtono en sia saluto ĉe la Inaŭguro tre alte taksis nian Tagon de la Paco. Dum ĝi ni pritraktos diversajn gravajn temojn de la paco, la mediprotektado, kaj la gardado de socia justeco.

La titolo de la matena sesio estos "Esperanto kiel ilo de pripaca edukado"; en la posttagmezo ni diskutos sub la titolo "La roloj de esperantistoj en la ekologiaj movadoj".

Ĉiu referanto rajtos paroli maksimume 10 minutojn. Nepre legu paĝon 64 de la Kongresa Libro. La referontoj kontaktu la ĉefan organizanton, s-ron Yoshimi Umeda, tuj antaŭ la komenco de la matena sesio.

## KONVERSACIAJ RONDOJ

Malgraŭ teknikaj malfaciloj la konversaciaj rondoj tamen funkcias. Aliĝis pli ol 120 homoj kun diversaj parolkapabloj. Tial ni faris 3 grupojn, kiujn gvidas 3 junuloj: Ankica Jagnjić (1836), Sylvain Auclair (1989) kaj Dario Besseghini (1994). Kontraŭ nekredeblaj obstakloj kaj kun IOM da helpo de LKK ni sukcesis eltrovi 3 ejojn, en kiuj ni povas kuniĝi por babili. Jen ili:

Salono Butler (Sylvain)
Ejo maldekstre de salono Zamenhof; ne bufedo; (Dario)
Ejo malantaŭ salono Bolingbroke Mudie (Ankica)

Ĉiuj novevenantoj iru al la grupo de Ankica. Salono Bolingbroke Mudie estas en la 3a etaĝo de la kongresejo. Vi estos kore bonvenaj!

ATENTU, KE LA KORTEGA CIRKULERO NE APEROS EN ĴAŬDO. Ni ja planas eldoni ĝin en merkredo, vendredo kaj sabato.

## Atentu Amerikanoj

Respondeculoj de amerikaj landaj asocioj kunvenos vendredon je 09.00 en salono Grabowski.

## KATO entuziasme ricevita

Nekutime spektebla artaĵo ĉe niaj UKoj: du horojn-kaj-duonon-daŭra teatraĵo. Kaj artnivele alta, larĝe konata teksto de mondfama usona aŭtoro: "Kato sur varma ladotegmento" de Tennessee Williams. Malfacilega defio por la 9kapa germana trupo, kies anoj cetere loĝas dise en distaj rezidlokoj. Kiel ili sukcesis tion realigi estas mistero, tamen la rezulto estis eksterordinare brila: preskaŭ profesinivela la recitado, elstare klara la elparolo, senstumbla kaj vigla la ritmo. Konsekvence: entuziasma akcepto fare de la spektantaro, dense enŝtopita en salono Brownlee hieraŭ posttagmeze.

La spektaklo ripetiĝas hodiaŭ, je 15.30, ĉe la sama ejo. (Aldo de Giorgi.)

## Aperis biblioteka terminaro

En la kunsido de la biblioteka asocio TEBA la ĉefa novaĵo estis prezento de la ĵus aperinta biblioteka terminaro seslingva, kiu ebligas tradukon de bibliotekaj terminoj ĉiudirekte inter Esperanto kaj la aliaj 5 lingvoj. La 240paĝa verko estis preparata dum pluraj jaroj. Samtempe prezentiĝis fotokopie havebla verko "Biblioteka klasifo de Esperanto".

# UKRAINO

Dank' al la lastatempaj ŝanĝoj en Sovetunio fondiĝis en majo Ukrainia Esperanto-Asocio, posteulo de la iama filo de ASE en la dua plej loĝata respubliko de la Unio. Kadre de la nova ukraina asocio ekzistas ankaŭ amiksocieto "Apogo", al kiu eksterlandanoj povas laŭdezire aliĝi.

Se vi ŝatus informiĝi pri la Esperanto-agado en Ukraino, pri "Apogo", pri reciprokaj vizitoj, turnu vin al la prezidanto de UkrEA: Evgeno KOVTONJUK, kongresa n-ro 2254; aŭ skribu al la adreso de UkrEA: Poŝta kesto 165, Kievo-1, SU-252001, Sovetunio.

## Aŭtomobilistoj serĉas gvidantojn

12 personoj partoprenis hieraŭ la kunvenon de Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista. Tiu asocio urĝe serĉas novajn gvidantojn, kiuj pretus transpreni la postenojn prezidanto kaj kasisto.

## TELEVIDO REFOJE ĈE INFANOJ

Hieraŭ, aldone al la kameraoj de BBC por la tutlanda infana novaĵbulteno, aperis en la infankongreseto ankaŭ la regiona kompanio TVS, filmante por la novaĵprogramo "Coast to Coast".

## 450 kongresanoj en Diservo

Pastroj Kobor kaj Weatherby celebris okaze de la ekumena Diservo dimanĉon posttagmeze. Katolikoj kaj protestantoj do povis kune ricevi komunion. Kantis la Londona Esperanto-Ĥoro kun la helpo de ĥoranoj el la Ekumena Kongreso, kaj Ernest Choldcroft ludis pianon. Tondre sonis la laŭtpreĝado de la Patro Nia kaj inter multaj esprimoj de kontento pri la ĉi-jara Diservo tute mankis plendoj! (David Featherstone.)

## Provludu por la Internacia Vespero

Prezentontoj en la Internacia Vespero havos ŝancon provludi en salono Baghy ekde 15.00 en vendredo.

## VIRINOJ KUNVENIS

La komisiono de UEA pri virina agado publike kunvenis por sekvi prelegon de s-ino King (Britio), en la angla lingvo kun traduko en Esperanto fare de s-ino Marjorie Boulton.

Ĉeestis 63 homoj: inter ili estis 3 viroj. S-ino King en vigla maniero prezentis sian asocion kaj unuafoje informiĝis pri Esperanto. Estis interkonsentite, ke kun ŝia helpo oni klopodos stariĝi kontaktojn inter KVA kaj neesperantistaj virinagantoj.

## Ne parku!

Ni forte petas al ĉiuj kongresanoj ne parki aŭton aŭ aŭtobuson antaŭ la kongresejo. Parkado tie estas kontraŭleĝa pro la nepro faciligi aliron de fajrobrigado kaj ambulancoj en okazo de akcidento. La polico havas juran povon monpuni, kaj fortiri laŭ sia bontrovo.

## FOKUSO

La redaktoro de la popularscienca magazino FOKUSO, András Lukács, kaj liaj kunlaborantoj, Gábor Márkus kaj Klára Mikola, atendas ĉiujn legantojn kaj interesiĝantojn ĉe la budo de FOKUSO en la kongreso.

## SOROBANO

Jam trifoje salonplenoj da kongresanoj ekkomprenis la fenomenon sorobano, la japana abako, kaj la entuziasmo kreskas.

Restas ankoraŭ unu prezento de sorobano, do ankaŭ vi povos vidi la specialistojn, kiuj kapablas kalkuli en la kapo (per "mensa abako") tiel rapide kiel eblas diri la ciferojn. Ankoraŭ eblas lerni, kiel konservi mensan kapablecon eĉ en maljuna aĝo; kiel instrui bazajn konceptojn de nombroj kaj kalkulado al infanoj; kaj kiel akrigi la propran penskapablon.

Venu al salono Holmes en la 2a etaĝo de la kongresejo vendredon je 14.00 por sperti mem la ŝajnan miraklon de ĉi tiu malnovega kalkulilo, kiu ankoraŭ taŭgas en la moderna socio.

Tiuj el vi, kiuj jam aĉetis sorobanon kaj komencis ekzerci sin laŭ la lernolibro, venu al la sorobanbudo, kie - se via fingrumado jam iom lertas - vi ricevos senpagan premion.

## KAPTITAJ VORTOJ

Jam prenu kun vi hejmen la plej interesajn erojn el la frua kongresprogramo: po 3 pundoj (+0,45 pundoj AVI) por ĉiu sonbendo. Petu mendilon kaj tuj redonu ĝin al Ivor Hueting. Bendoj estos pretaj vendredon, se vi mendos hodiaŭ aŭ morgaŭ. Serĉu la budon en la kongresejo.

## Komputilistoj rekunvenos

Dua kunveno de la Esperantista Komputila Klubo (por la pli teknikaj anoj) okazos mardon je 18.00 (ĝis 19.00) en salono Holmes. La diskutotemo estos: praktikaj paŝoj por la estonta agado.

# NOVAJ ALIĜOJ

| | | |
|---|---|---|
| 2109 | hapa-p | HABEZA, S-ro Pavol, Ĉeĥoslovakio |
| 2110 | kinj-a | KINČEK, S-ro Július, Ĉeĥoslovakio |
| 2111 | kntr-z | KANTOR, S-ro Bohuš, Ĉeĥoslovakio |
| 2112 | mkjn-m | ŠIMEK, S-ro Ján, Ĉeĥoslovakio |
| 2113 | mrck-i | MARČEK, S-ro Stanislav, Ĉeĥoslovakio |
| 2114 | ngym-t | NAGY, S-ro Miroslav, Ĉeĥoslovakio |
| 2115 | sieg-j | SIEGEL, S-ro Erich, Ĉeĥoslovakio |
| 2116 | stma-a | MARČEK, S-ro S., Ĉeĥoslovakio |
| 2117 | uhrv-l | UHRIN, S-ro Viliam, Ĉeĥoslovakio |
| 2118 | vivn-e | VÁLEK, S-ro Ivan, Ĉeĥoslovakio |
| 2119 | shdr-r | SHADMEHR, S-ro L., FR Germanujo |
| 2120 | dequ-l | QUIRKE, S-ro D., Britujo |
| 2121 | dmke-h | KEY, S-ino Dorothy, 36 Fairways Drive, Blackwell, Bromsgrove, Britujo, B60 1BB |
| 2122 | hlsb-r | HOLSER, S-ro B., Britujo |
| 2123 | | HINELY, S-ro James W., 6 Littleway Road, Oxford, Britujo OX4 3EG |
| 2124 | | RIGG, S-ino Lesley A., sama adreso |
| 2125 | btol-x | TOLA, S-ro B., Italujo |
| 2126 | mtol-b | TOLA, S-ro M., Italujo |
| 2127 | iksu-b | SUGITA, S-ino Ikuko, Oomoto, Kameoka-shi, Kyoto-hu, 621 Japanujo |
| 2128 | ktos-w | KAŬAI, S-ro Toŝijuki, sama adreso |
| 2129 | kuhi-t | HIROSE, S-ino Kurenai, sama adreso |
| 2130 | anji-c | AN, S-ro Jin-su, 10-642 CPO Kesto 4258, Seulo, Korea Resp. |
| 2131 | bibe-n | BRENANDER, S-ino Birgit, Bergsgatan 28, S-112 23 Stockholm, Svedujo |
| 2132 | elka-i | MINČEVA, S-ino Elka, lando neklare indikita |
| 2133 | tufu-b | MAFUILA, S-ro Tufuene, lando neklare indikita |
| 2134 | mped-p | PEDERZINI, S-ro M., Italujo |
| 2135 | gils-x | SO, S-ro Gilsu, Yangchon PO Kesto 12999, Seoul, Korea Resp. |
| 2136 | coaz-w | ČOLIĆ, S-ino Azra, Halil Bašica 23, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio |
| 2137 | krkm-w | KRAKAN, S-ino Margareta, lando neindikita |
| 2138 | kvln-b | KOVALČEK, S-ino Nataša, lando neindikita |
| 2139 | medt-c | EMINAGIĆ, S-ro Zdran, Maršala Tita 110, 74270 Teslić, Jugoslavio |
| 2140 | perd-a | PAŠIĆ, S-ro Vedad, Maršala Tita, 74270 Teslić, Jugoslavio |
| 2141 | vued-i | VUKOVIĆ, S-ino Edita, Peoleterskih Brigada 20, 74270 Teslić, Jugoslavio |
| 2142 | deke-i | KEEBLE, S-ino Dorothy, lando neklare indikita |
| 2143 | veau-n | VEAUX, S-ino Michelle, Francujo |
| 2144 | kebr-d | BRENT, S-ino K., Britujo |
| 2145 | sjon-j | JONES, S-ino Shirley A., Sunnydale, 4 Avenue Road, Ifracombe, Britujo |
| 2146 | csda-t | CSABA, S-ro David, Hungarujo |
| 2147 | mhst-h | STANLEY, S-ro M.H., lando neindikita |
| 2148 | tsrm-z | TIŠLJAR, S-ino Maja, Jugoslavio |
| 2149 | itzo-u | GUTIEREZ, S-ro M., lando neklare indikita |
| 2150 | bmmj-k | BROWN, S-ro Michael J., 8 Helen Close, Cambridge, Britujo |
| 2151 | jukk-z | PIETILAINEN, S-ro Jukka, Puutarhakatu 12 B 18, 40200 Jyvastyla Finnlando |
| 2152 | gdwi-? | WINKLER, S-ro Georgo, Jaegerstr. 27, D-4200 Oberhausen, FR Germanujo |
| 2153 | whnr-r | HEINRICH, S-ro Werner, Guineastr. 36, D-1000 Berlin 65, FR Germanujo |
| 2154 | sutn-i | SUTTON, S-ro G.B., Novzelando |
| 2155 | | GLORIEUX, S-ro Piet Paul, Kapellestr. 42, 8573 Anzegem, Belgujo |
| 2156 | acjr-? | RAWLINSON, S-ro Antony C.J., 21 Stanley Buildings, Pancras Road, London, Britujo NW1 2TG |
| 2157 | | HÄUSLER, S-ino Gerda M.U., Robert-Seitz-Str. 2, Magdeburg 3060, Germana DR |
| 2158 | eswi-? | SCHWARZER, S-ino E., FR Germanujo |
| 2159 | | RONCOVÁ, S-ino Gabriella, Hradky 86, 91401 Trenc. Teplá, Ĉeĥoslovakio |
| 2160 | | KERN, S-ro Otto, Juesholzstr. 38, D-3420 Herzberg, FR Germanujo |
| 2161 | | LUKASZEWSKA, S-ino Barbara, 15004 Bialystok, Sienkiewicza 28 m 3, Pollando |
| 2162 | | TRIOLLE, S-ino Raymonde, 10 rue Camus, 89300 Caroullon, Francujo |
| 2163 | | MALGORZATA, S-ino Mirowska, Pollando |
| 2164 | | DELCARMINE, S-ro Savino Giovanni, Via Piadera 13, Vittorio Veneto (Treviso), Italujo |
| 2165 | | ARGENTAIS-PERRIN, S-ino Anne, 12B Allée de Rivasselou, St. Malo, 35400 Francujo |
| 2166 | | RIGAUD, S-ino Marie-Hélène, Vieille Côte de la Dreche, 81000 Albi, Francujo |
| 2167 | | ARCHER, S-ro Christopher, 8 Graham Terrace, Pittington, Durham, Britujo DH6 1AU |
| 2168 | | FANTOM, S-ro Ian D., 92 Enborne Road, Newbury, Britujo RG14 6AN |
| 2169 | | CUMMINGS, S-ro John, 23 Milward Road, Hastings, Britujo TN34 3RP |
| 2170 | | FAVARON, S-ro Giorgio, V.A. Colotti 27/32, 35133 Padova, Italujo |
| 2171 | iswi-u | WIBBERLEY, S-ro Jano, 16 Weymouth Court, Upper Tulse Hill, London, Britujo SW2 2SH |
| 2172 | | OLIVER, S-ino Randi, 3 Monks Court, Powers Hall End, Witham, Britujo |
| 2173 | | JOHNSON, S-ro Barclay D., 418 Lisgar St., Ottawa, Kanado K1R 5H1 |
| 2174 | | DEUTSCH, S-ro Gernot, Fritz-Frey-Str. 5, D-6900 Heidelberg, FR Germanio |
| 2175 | | MARTINEZ GARCIA, S-ino Delia M., C/. Regueral 14,1 Dcha., 33710 Navia Casturias, Hispanujo |
| 2176 | | GRUND, S-ro John, 12 Farrington Avenue, Bay Shore, NY 11706, Usono |
| 2177 | | SIMONIN, S-ino Catherine, 92 rue du Fg. du Temple, 75011 Paris, Francujo |
| 2178 | vlit-r | VAN DER VLIET, S-ro Jan, P. Mulderplantsoen 39, 1785 GR Den Haag, Nederlando |
| 2179 | mlle-u | MULLER, S-ro Edgar Werner, 9 Corn Drill Close, Abingdon, Britujo, OX14 2ND |
| 2180 | joar-w | ROHDE, D-ro Joachim, Parkstr. 69, Berlin-Weissensee, DDR-1120 Germana DR |
| 2181 | | SIMMERLE, S-ino Theresia, Capristr. 32, I-39100 Bozen, Italujo |
| 2182 | | FILEWA PENKA, S-ino Dimitrowa, Sofio 1113, Komplex Istok Bl. 54, Bulgarujo |
| 2183 | | BONACCORSO, S-ino Anna, Via Portosalvo 19, I-95041 Kaltaĝiruno Italujo |
| 2184 | | VELA, S-ino Davorka, Boraca Nor-a 19, 58327 Podgora, Jugoslavio |
| 2185 | | KULEVSKI, S-ro Stojan, 21000 Novi Sad, Boškabuha 4/2, Jugoslavio |
| 2186 | | PULLI, S-ino Rutta M., Kulkustie 3 B 14, 36240 Kangasala, Finnlando |
| 2187 | | SAFFAR, S-ino Mitra, Henri-Dunant-Str. 30, 6110 Diebur, FR Germanujo |
| 2188 | | GOFFART, S-ro Benoit, Grand Sablon 34, Belgujo |
| 2189 | | LIEBERMANN, S-ro Jaakov, Ramat-Gan, Maalé-Hashoevastr. 6, Israelo |
| 2190 | | EMERIANOV, S-ro Gennadij G., Emeljanov p/k 478, Rostov-Don, SU-344011, Soveta Unio |
| 2191 | | JELAGINA, S-ino Ludmila, 344034 Rostov-Don, Parusuyji 36, Soveta Unio |
| 2192 | | ŜLJAFER, S-ro Aleksandro, P.O. Kesto 261, SU-634041 Tomsk, Soveta Unio |
| 2193 | | KIRILLOVA, S-ino Irina, SU-634041 Tomsk 41, str. Kirova 32-22, Soveta Unio |
| 2194 | | KONCEBOVSKI, S-ro Stanislavo, 80-2-898 Kaŝirskoje Ŝose', Soveta Unio |
| 2195 | | SHERSTNJOVA, S-ino Elena, Moskva Reg., Ŝĉolkovo, Ivanova 15/19-11, Soveta Unio |
| 2196 | | KLJAĈKO, S-ino Tamara, SU-109444 Moskva, Perganskaja 15-1-54, Soveta Unio |
| 2197 | | GONĈAROVA, S-ino Irina, SU-143000 Odincovo-2, Molodjoĵnaja 38-10, Soveta Unio |
| 2198 | | SKŪPAS, S-ro Laurynas-Algis, Vilnius, str. Krantines 12-27, Litovujo, Soveta Unio |
| 2199 | | KMEŽEVIĆ, S-ino Nada, Kej 12 srpske brigade 29, 36300 Novi Pazaz, Jugoslavio |
| 2200 | | KNEŽEVIĆ, S-ino Sunčica, sama adreso |

# Sesa SUS en San Marino

*AIS informos vendredon, 15:30 h, en salono Lapenna:*

**Limdato por favorpreza aliĝo**

La 6a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 6) solene malfermiĝos (post semajnfina ILo-rapidkurso de Dr.W.Bormann por la partoprenontaj ne-esperantistaj sciencistoj) dimanĉvesperon, la 27an de aŭgusto, en la muziklernejo de Borgo Maggiore, Respubliko de San Marino. La inaŭguran parroladon ĉijare transprenos d-ro L.Zaleski-Zamenhof, kiu dum SUS 6 fariĝos profesoro de AIS.

Jam pro la oferto de 26 sciencaj kursoj SUS 6 estos la plej ampleksa ĝisnuna studadsesio de AIS. La programo estos havebla dum la sinprezentado de la Akademio, vendredon, de 15:30 ĝis 17:00 h en salono Lapenna. Tiu kunveno estos ankaŭ la lasta eblo favorpreze aliĝi al SUS 6: la nuna aliĝkotizo, nome 0,3 AKU (22 500 LIT aŭ 30 DM aŭ egalvalora alivaluta sumo) kreskos poste al 0,5 AKU!

Ĉiuj partoprenantoj de la 74a UK estas alvokitaj subteni la internacilingvan laboron de AIS per aliĝo kiel subtenaj membroj. Kiu studis minimume 2 jarojn estas invitita aliĝi al la Internacia Sciencista Kolegio (ISK) de AIS, eĉ se li/ŝi ne plu studas aŭ scienca laboras. Kiu restas „libera ISKano", ne akceptanta la alvokon al pli grandaj devoj, per tio sin devigas nur al la pago de simbola kotizo: jare 0,04 AKU (3 000 LIT aŭ 4 DM) - pagebla ankaŭ per 4 IRK aŭ - laŭpete - transprenota por scienculoj el landoj kun transpagaj problemoj fare de la Dr.Klemm-fonduso. Aliĝiloj kaj informiloj estos je dispono dum la AIS-kunveno vendredon posttagmeze.

OProf.Dr.H.Frank
Prezidanto de AIS

# Aliĝu al la Kampanjo Javari

La valo de la rivero Javari en la okcidenta ekstremaĵo de Amazonio ĉe la limo inter Peruo kaj Brazilo estas la miljara rezidejo de pli ol 3000 indianoj, de diversaj triboj, kies kutimoj kaj etnaj valoroj estas nekonataj jen de la brazila socio jen de la mondo.

La ĉirkaŭan teritorion senĉese invadas la ligna kaj guma industrioj kaj tiuj, kiuj deziras ekspluati ĝian petrolon.

En tia situacio la indianoj estas kondamnitaj al ekstermo.

Kampanjo Javari celas interveni. Detalojn vi povas ricevi de la esperanto-peranto, Vincenzo Delehaye, Via Francesco De Mura 23, 80129 Napoli (NA), Italio. Aŭ prenu flugfolion en la kongresejo.

# LA NOVA ESTRARO

Hieraŭ posttagmeze la komitato de UEA en eksterordinara kunsido elektis la novan estraron, kiu laboros sub gvido de prezidanto John Wells dum la venontaj 3 jaroj. Jen la novaj estraranoj (ricevitaj voĉoj interkrampe):

Ulrich Lins, FR Germanio (vicprezidanto, 54)
So Gilsu, Korea Respubliko (vicprezidanto, 54)
Osmo Buller, Finnlando (ĝenerala sekretario, 61)
Gregoire Maertens, Belgio (49)
Spomenka Štimec, Jugoslavio (48)
Roman Dobrzyński, Pollando (44)
Oszkár Princz, Hungario (44)
Ivo Durwael, Belgio (41)

Du pliaj kandidatoj ne elektiĝis: s-roj Zvara (39) kaj Texier (25).

La estraranaj taskoj ankoraŭ ne estas disdonitaj.

# NI PRETIĜU POR LA JARO DE LA RUSA KULTURO

Laŭ decido de UN/Unesko, 1991 estos la Jaro de la Rusa Kulturo.

Por marki tiun jaron ankoraŭ ne estas malfrue iniciati ankaŭ Esperanto-aranĝojn. Moskva Scienca Esperanto-Klubo do proponas organizi RUSAN SESION de la AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ SANMARINO. Ĝi estu dediĉita al la rolo de la rusa kulturo en estiĝo de la internaci-lingva ideo kaj inverse (la hejma lingvo de Zamenhof estis la rusa), kaj al la rolo de la Esperanto-movado en la konservo kaj disvastigo de la etnaj kulturoj (kun speciala atento al la rusa).

Por ĉion ĉi sukcesigi ni devas jam dum la 74a UK lanĉi la laboron de internacia organiza komitato. Ĉiuj interesitoj estas do invititaj al unua preparkunveno ĵaŭdon je 18.00 en salono Zamenhof.
(Lev Medvedev, prezidanto de Moskva Scienca Esperanto-Klubo.)

## SUBTENU

la iranan E-movadon per aĉeto de

**Robaioj de Kajjam**
**Gazaloj de Hafez**

en la Libroservo.

Ĉi tiuj belegaj volumoj estas la sola rimedo por membriĝo de irananoj en UEA.

# Interhelpa servo

En la kunveno pri landa agado oni decidis aranĝi "interhelpan servon" inter landaj asocioj, kiuj bezonas materialojn (librojn k.s.), kaj landaj asociaj, kiuj havas kaj pretas ilin donaci.

Dum la kongreso respondeculoj de landaj asocioj, kiuj apartenas al unu el tiuj kategorioj, bonvolu kontakti Michela Lipari Sato (102) aŭ W. Harmon (316).

La interhelpa servo ne disponigos monan helpon.

LA KORTEGA CIRKULERO

de la 74a Universala Kongreso de Esperanto, Brajtono, Anglujo. 1989

Merkredon, la 2an de aŭgusto **No 4**




"Kia estas la gajno de kato sur varma ladotegmento? Se nur mi scius. Simple resti sur ĝi, mi supozas: tiel longe, dum ŝi povas..."

(Judith Bormann de la teatra grupo Kia Koincido.)

# Anonciĝas la Belartaj Premioj

Hieraŭ je 17.00 oni anoncis la gajnintojn en la Belartaj Konkursoj 1989. Gratulon al ĉiuj premiitoj!

## Poezio

Unua premio: Krys Ungar (Britio) pro "Balonoj".
Tria premio: Neil Salvesen (Nederlando) pro "Dis" kaj Krys Ungar pro "Subterfervoja incidento".
Honora mencio: Ulrich Becker (Germana DR) pro "Dorminto en valo" kaj Timothy Carr (Britio) pro "Iras abiturient'".

## Prozo

Dua premio: Eŭgeno Belonenko (Soveta Unio) pro "La blinda modlisto".
Tria premio: Neil Salvesen pro "Felikso".

## Teatraĵo

Unua premio: Stefan MacGill (Hungario) pro "Kaptito".
Tria premio: István Ertl (Hungario) pro "En kesto".

## Kanto

Premio An-okin: Janet Rawling-Keitel (FR Germanio) pro "Malgranda birdo".

## Fotografio

Tria premio: Anne-Liisa Ali-Simola (Finnlando).

## Nova Talento

Pokalo Henry Harabaĝiu: Georgo Kamaĉo (Hispanio) pro la eseo "Originalaj romanoj en Esperanto: panoramo kaj perspektivoj".

## Infanlibro de la Jaro 1988

"Anne Frank ne estas de hieraŭ" (Mies Bouhuys) en traduko kaj eldono de Nora Bartels.

# Gravaj informoj por postkongresoj

Se vi mendis postkongresan ekskurson, bonvolu ĉeesti en salono Holmes ĵaŭdon je la ĉisube indikita horo por renkonti viajn gvidontojn kaj ricevi gravajn informojn:

| | |
|---|---|
| Al Skotlando | 14.00 |
| Al Kimrio | 15.00 |
| Al Irlando | 16.00 |

## Columbus-500

El la laborlingvoj de la Internacia Paco-Ekologia Ekspedicio "Columbus-500" (rusa, angla, hispana, Esperanto) ĝis nun plej efikis en la internacia informado Esperanto!

Ĉiuj interesitoj turnu sin al Lev Medvedev (1506). Filmo pri la ekspedicia navigilo - polimarano - estos spektebla kadre de la Tago de la Paco je 16.00.

## Kunveno kun sovetaj kongresanoj

Esperanto-novaĵojn el Soveta Unio vi povas ekscii ĵaŭdon: renkontiĝo kun sovetaj esperantistoj, ekspozicio de afiŝoj pri perestrojko, paco kaj naturprotekto k.s. Startopunkto: la kongresa ĉefenirejo je 18.00. Malfruiĝintoj ricevos klarigojn ĉe la informejo.

# NOVAJ ALIĜOJ

2201 BOGAVAC, S-ino Irina, Gojka Balanina 43, 36300 Novi Pazar, Jugoslavio
2202 STEFANOVIĆ, S-ro Rodoljub, Oslobodenja 89, Novi Pazar, Jugoslavio
2203 MIKOLA, S-ino Klára, H-3600 Ozd, Vajda u. 8, Hungarujo
2204 PAŹDZIOR, S-ino Anna, Głuszulyzna 42, 21 054 Głusk, Lublin, Pollando
2205 PIERZIHAŁA, S-ino Aneta, Radom, ul. Bogusławskiego 6/3, Pollando
2206 TART, S-ro Michael J., 21 Rugby Place, Bradford, Britujo BD7 2DF
2207 RABERGER, S-ino Elisabeth, Heiligkreuzstr. 27, CH-9008 St. Gallen, Svislando
2208 BROWN, S-ro Michael J., 8 Helen Close, Cambridge, Britujo
2209 KIALA, S-ro Mbala P., CP 18261, Luanda, Angolo
2210 DOBREVA, S-ino Peŝka, 1156 Sofia, K. Mladost 88 81 vii 5, Bulgarujo
2211 MOCHIZUKI, S-ro Masahiro, 1047-3 Shizuoka-shi, Japanujo
2212 KOBAYASHI, S-ro Ichinosuke, 1-29-18 Shimoigusa, Suginamiku, Tokio, Japanujo
2213 KOBAJAŜI, S-ino Nobu, sama adreso
2214 KUBOTA, S-ro Shinichi, Kiyose-shi, Matsuyama 2-8-11, Japanujo
2215 SATOUCHI, S-ino Chieko, 6-16-1 Chitosedai, Setagayaku, Tokio, Japanujo
2216 HONMA, S-ro Hiroshi, 3-1-1 Yokoyama, Sagamihara-shi, Japanujo
2217 SAKATA, S-ino Akie, Nerima-ku, Hikari-ga-oka 3-8-12-1306, Tokio, Japanujo
2218 HOFMANN, S-ino Nadi, Am Schloss Stockau 15, 6110 Dieburg, FR Germanujo
2219 SCHÜTTE, S-ino Constanze, Am Rinkenbühl 96, 6110 Dieburg, FR Germanujo
2220 ENGELBRECHT, S-ino Christine, 7 Avenue Emile Massarel, 75017 Paris, Francujo
2221 TALG, S-ino Irene, Apartado 9, Puerto de la Cruz, E-38400 Hispanujo
2222 ACHKAR, S-ro Roger, p/a Christiaens, 25 rue Hobbema, 1040 Bruxelles, Belgujo
2223 COUZY, S-ino Christèle, 34 av. Pompidou, 92500 Rueil-Malmaison, Francujo
2224 OZAŬA, S-ino Kazuko, 15-11 Koriniŝinocĵo Nefaĝaŭa-31, Oosaka, Japanujo
2225 NIŜINO, S-ro Yositaka, Oomoto Tenonkjo, Kyoto-hu, Japanujo
2226 MINČEVA, S-ino Elka, Sofio, Str. Samuil N2, Bulgarujo
2227 WITUSYŃSKI, S-ro Jerzy, ul. Rożana 15, 33300 Nowy-Sącz, Pollando
2228 WITUSYŃSKA, S-ino Joanna, sama adreso
2229 BASS, S-ro Jeremy, 3470 Durocher 401, Montréal, Québec, Kanado H2X 2E1
2230 DE IAPINIS, S-ro Francesco, Viale Mellusi 83, 82100 Benevento, Italujo
2231 BRUNO, S-ro Marino, Via De Canal 41, 10137 Torino, Italujo
2232 IONICO, S-ro Antonio, Via Ferrelli 8, 82100 Benevento, Italujo
2233 GLORIEUX, S-ro Piet Paul, Kapellestraat 49, 8573 Anzegem, Belgujo
2234 AHMAD, S-ro Rafiq, 84-C, Faisal Town, Lahore, Pakistano
2235 HALLMARK, S-ro Henry M., PO Box 22926, Santa Barbara, CA 93121, Usono
2236 BROOKS, S-ro Lou, 5 Park Drive, Upminster, Essex, Britujo
2237 HOFMANN, S-ino Nuna, Am Schoss Stockau 15, FR Germanujo


Duplikataj numeroj

2233 MOLEÓN, S-ro F., Peensestraat 44B, Rotterdam, Nederlando
2234 OSEI, S-ro Akŭasi O., POB 1934, Kumasi, Ganao
2235 HELLER, S-ro Mark N., SU-327055 Nikolajev, prosp. Lenina 14113-77, Sovetunio
2236 ROGOZIŃSKA, S-ino Ewa Elzbieta, Warszawa 02 714, ul. Obserwatorów 1 m 1, Pollando
2237 MACKENZIE-WINTLE, S-ino Sheila, 15 Balmain Close, Grange Road, Ealing, London, Britujo W5 5BY

2238 CHAMBREUIL, S-ro Jean M., 8A rue Boegner, 67000 Strasbourg, Francujo
2239 RADOS, S-ro Péter András, H-1031 Budapest, Varsa u. 8.I/3, Hungarujo
2240 DALL'AGLIO, S-ino, Via Raffaello 18, Medesano (Parma), Italujo
2241 MININ, S-ro Vladimir, PO Kesto 261, SU-637041 Tomsk, Soveta Unio
2242 BAGHERZADEL, S-ro Alaleh, BM-ESSY, London, Britujo WC1N 3XX

Duplikata numero

2242 HOWARD, S-ro Richard, 15 Blackberry Lane, Briar Hill, Northampton, Britujo



La komitato de UEA konsideras la agadon de la pasinta jaro dum la Unua Ĝenerala Kunsido

## Trihora rondvojaĝo

Ambaŭ prelegoj pri Britio estis plenŝtopitaj, sed kun ĉiĉerono Will Green la ĉeestantoj sukcese transportiĝis de Brajtono ĝis la skota plejnordo kaj reen ĝis la suda pinto de Anglio sen eĉ forlasi la kongresejon.

## Kunveno sen prezido

De 9.00 ĝis 10.30 hieraŭ kunvenis en salono Bolingbroke-Mudie pli ol 50 kongresanoj por partopreni la anoncitan komisionan sesion pri turismo.

Sed, malgraŭ granda interesiteco pri la temo, neniu respondeculo prezidis aŭ eĉ sendis senkulpigan klarigon pri la neĉeesto.

Tamen, oni profitis la okazon por diskuti interalie pri tio, ke por homoj el netranspagipovaj landoj praktike estos neeble partopreni la venontjaran UK en Kubo. Ĉiuj facile komprenas, ke neniu oficiala instanco subtenos la partoprenon de personoj el socialismaj landoj el aranĝo de alia socialisma lando, kiu estas pagenda per "valutoj". Neniu, kiu volas antaŭenigi la Esperanto-movadon povas apogi tian nekredeblan malhelpon. Ĉu eble respondeculoj de UEA timas devon respondi al tiklaj demandoj ĉi-rilate?

(Redakcia noto: Tiu ĉi raporto ne estas subskribita. La redaktoro aperigas ĝin pro la graveco de la demandoj, kiujn ĝi levas. Li tamen ne aliĝas al ĝia tono.)

## Etnistoj okupiĝas pri Kosovo

35 reprezentantoj de 15 etnoj ĉeestis la IKEL-kunsidon hieraŭ. Oni vigle diskutis la pozicion de albanoj kaj serboj en Socialisma Aŭtonoma Provinco Kosovo (Jugoslavio). La plurfojan konstaton pri malvastigo de la aŭtonomio kontestis la unusola ĉeestanta serbo, dum aliaj partoprenantoj - ankaŭ el Jugoslavio - ĝenerale konsentis kun la enkonduka parolado de la IKEL-prezidanto.

Publika membrokunveno okazos ĵaŭdon je 14.00 en salono Privat.

## Hammer honoriĝas ĉe Skoltoj

En sia jarkunveno hieraŭ matene Skolta Esperanto-Ligo transdonis honoran membrecon al s-ro Ko Hammer, dum pluraj jaroj ĝenerala sekretario de la Ligo.

# BONVENON AL BJALISTOKO

Jam post 10 jaroj Bjalistoko deziras gastigi partoprenantojn de la 84a Universala Kongreso de Esperanto. La kongreso okazos tie, se la esperantistoj pruvos sian intereson pri la konstruata Zamenhof-Centro.

Funkcias informa giĉeto "Bjalistoka Centro", ĉe kiu vi povas informiĝi pri la projekto. Samloke vi povas aĉeti "briketojn" por la Centro. Tiuj, kiuj faros ĝis vendredo, partoprenos lotumadon kun diversaj premioj.

Ĉe la sama giĉeto haveblas nova videofilmo (reĝisorita de la nova UEA-estrarano Roman Dobrzyński), kiu prezentas la kulturan riĉecon kaj bunton de la bjalistoka regiono.

La lotumado, kune kun aŭkcio, okazos vendredon je 18.00 en salono Zamenhof.

# ĈINOJ INFORMAS

Pro la lastatempaj eventoj en Pekino malmultaj ĉinaj esperantistoj sukcesis atingi nian kongreson. Tan Xiuzhu kaj Zhu Mingyi tamen ĉeestas kiel reprezentantoj de Ĉina Esperanto-Ligo kaj de El Popola Ĉinio, kaj ili alportis la jenajn novajojn.

1. En 1992 en Ĉinio okazos la 5a Pacifika Kongreso de Esperanto. ĈEL jam bonvenigas vin.

2. EPĈ festos sian 40jariĝon en majo venontjare.

3. Kunlabore kun la hospitalo sub la Akademio de Ĉina Medicino, EPĈ faris vidbendon pri ĉina masaĝo en angla kaj Esperanta versioj.

4. Ĉiuj membroj de UEA kaj legantoj de EPĈ ĝuas rabaton de 5%, kiam ili loĝas en hoteloj sub la Ĉina Amikeca kaj Turista Hotelgrupo.

## Gejoj mankos en Havano

La 10a ĝenerala kunveno de la Ligo de Samseksemaj Geesperantistoj (LSG) okazis kun 36 ĉeestantoj lundon vespere ĉe geja hotelo en la urbo. En ampleksa tagordo leviĝis la demando, kie okazigi la venontjaran kunvenon. Oni raportis, ke en Kubo la registaro malliberigas gejajn kaj negejajn aideso-suferantojn, kaj ke gejeco tie estas krimo. Kun bedaŭro LSG do decidis, ke ne estos eble partopreni la Universalan Kongreson en Havano, kaj anstataŭe kunvenos en Stokholmo aŭguston 1990 kadre de la Internacia Lesba kaj Geja Asocio.

Por informiĝi pri la agado de LSG turnu vin al kongresnumero 372 aŭ 1319.

## Aŭtoroj aŭtografos

ULRICH LINS subskribos por kongresanoj sian verkon La danĝera lingvo inter 11.00 kaj 12.00 ĵaŭdon en la kongresa libroservo.

JOHN WELLS subskribos sian libron Lingvistikaj aspektoj de Esperanto kaj sian Esperantan/kimran vortaron inter 10.00 kaj 11.00 vendredon, ankaŭ ĉe la libroservo.

## ANONCETOJ

Kiu volas organizi prelegovojaĝojn aŭ turismajn interŝanĝojn kun sovetaj esperantistoj, tiu turnu sin al A. Melnikov (668).

Ĉar ASE ne plu ekzistas, ĝia adreso jam ne validas. Skribu nun al SEU, Samodaj V. "Moscow News", Gorky str. 16/2, Soveta Unio (tel. 229-58-72).

# WELLS KRITIKAS BRITAN LEĜON

Hieraŭ okaze de la Tago de la Lernejo la nova prezidanto de UEA apelaciis al la brita ministerio pri edukado enpreni Esperanton en la ŝtatan instruplanon.

Tiu plano estas kreita laŭ la postuloj de reformleĝo lastatempe aprobita laŭ rekomendo de la registaro; sed ĝi efektive malpermesas al la ŝtataj lernejoj instrui Esperanton kiel unuan fremdan lingvon.

Profesoro Wells pledis por rapida modifo de la instruplano: "Tiuj, kiuj vidis la internacian infankongreseton, kiu nun okazas en Rottingdean, ne povas ne imponiĝi, ke 33 infanoj el 15 landoj povas kune ludadi tiel nature, uzante nur Esperanton je tia frua aĝo. Kaj de la plimulto - eventuale de ili ĉiuj - Esperanto estas ja la unua fremda lingvo."

## Religio kiel edukilo

80 kongresanoj partoprenis la interreligian kunvenon hieraŭ en salono Brownlee por aŭdi referaĵojn pri la temo "La eduka rolo de la religio en la familio". Referis 10 personoj el malsamaj religiaj medioj. Oni konfirmis la decidon de antaŭ unu jaro fondi Asocion de Studado Interreligia pri la Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj (ASISTI): interesitoj kontaktu Christian Lavarene, Les Margaillaus, Ligane, 13540 Puyricard, Francio.

## Esperanto-hotelo en Harcmontaro

Oni lanĉis projekton de Esperanto-hotelo, kiu celas malfermiĝi fine de 1990 en la bela montara urbo Herzberg (Kormonto), FR Germanio. Por financi la projekton oni nun vendas akciojn en la proprieta kompanio (registrita en Delaware, Usono). Ĉiu akcio kostas 500 usonajn dolarojn. Por tiuj, kiuj deziras subteni sed ne disponas pri tiel granda sumo, eblas aĉeti ankaŭ "akcietojn": t.e. centonojn de akcio. Serĉu la standon KORMONTO en la kongresejo!

## Blinduloj serĉas helpantojn

Oni urĝe serĉas personojn, kiuj dum sabato estos pretaj renkonti alvenantajn blindulojn en la stacidomo Brighton Central kaj helpi ilin ŝanĝi en lokan trajnon al Falmer.

Aparte grave estas renkonti grupon de 24 italoj, kiuj alvenos je 18.45.

Kontaktu John Wells (1293: ne konfuzu lin kun la prezidanto de UEA!) per la rendevua tabulo aŭ lasu mesaĝon por li ĉe Norfolk Regent Hotel.

## LI KANTIS POR TUTA LA MONDO - INKLUZIVE VIN

Vi aŭdis Stephen Thompson jam en Londono kaj dum la Nacia Vespero, kiam li iom mallongigis sian programon pro malfrueco. Tamen ne perdu esperon, li proponas al vi la eblon aŭdi la plenan programon - kaj pli - per aĉeto de liaj kasedoj. Haveblas "Kanto por tuta la mond'" kaj "Kanto por Kristnasko."

## Bermano ofertas flugon al Havano

Esperanto-Centro Paderborno kunvenis lundon. Al la ĉirkaŭ 100 partoprenantoj la direktoro H. Bermano detale prezentis sian projekton de flugkaravano al la 75a Universala Kongreso en Havano. Prezo: 990 germanaj markoj per kuba ĉartaviadilo (Kolonjo-Havano-Kolonjo).

La prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio, J. Kastelo, multe klarigis pri la lando kaj ĝia Esperanto-movado kaj respondis demandojn.

Por informoj pri la karavano, direktu vin al kongresnumero 729 (Behrmann).

## Se vi vizitos la infanojn

Infanoj en la infankongreseto ekzercas sin por prezenti al la plenkreskuloj vendredon ekde 15.00. Oni planas interalie kantadon kun orkestreto de flutoj, klarnetoj, violono, piano kaj gitaro. Aliaj eroj inkluzivos skeĉojn, poemojn, solludadon per diversaj instrumentoj.

Vizitantoj alvenu ekde 14.30. La kongresetejo estas lernejo St. Aubyns. Aŭtobusoj 14a kaj 14b veturas regule de Churchill Square malantaŭ la UK-kongresejo. Petu "High Street Rottingdean".

## SCIENCA APLIKADO

25 kongresanoj el 16 landoj venis al la kunsido pri la scienca aplikado de Esperanto. La kungvidantoj estis Diccon Masterman (anstataŭanto por Ottó Haszpra) kaj François Lo Jacomo.

D-ro Lo Jacomo prezentis koncize la celojn de la scienca aplikado: informado, eldonado kaj servoj. La alparoloj koncentriĝis ĉefe ĉirkaŭ eldonado de sciencaj artikoloj kaj resumoj. András Lukács, redaktoro de FOKUSO, pretas aperigi resumon de ĉiu ajn scienca artikolo. Shen Chenru, redaktoro de TUTMONDAJ SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ, simile esprimis deziron aperigi sciencajn artikolojn.

LA KORTEGA CIRKULERO

de la 74a Universala Kongreso de Esperanto, Brajtono, Anglujo. 1989

Vendredon, la 4an de aŭgusto

No 5

# Duelo kontraŭ la angla

Mardon okazis debato en salono Lapenna inter profesoro Honey, kiu instruas la anglan lingvon en la japana Universitato de Humamoto, kaj la nova prezidanto de UEA kun la temo "Ĉu Esperanto ĉu la angla estas solvo de la monda lingvo-problemo

La salono estis tro malgranda kaj la amasa publiko devis eksidi surplanke. Prezidis la debaton profesoro Humphrey Tonkin, kiu klarigis, ke profesoro Honey, defendonte la anglan lingvon antaŭ kontraŭa publiko, praktikas la britan nacian kutimon "sportisme malvenki".

La argumentoj eldiritaj de profesoro Honey post la enkonduka parolado de profesoro Wells estis, ke eĉ se ne estas juste, ke la angla estu la lingvo de internacia komunikado, ĝi nun tio estas; ni ne povas ŝanĝi la faktan realon. Due, se Esperanton efektive parolus dekoj da milionoj da homoj dise tra la mondo, ĝi fariĝus same malregula kaj disdialektiĝinta kiel la angla.

Al tia argumentado respondis pluraj parolantoj el la publiko (aparte sprita estis la interveno de So Gilsu), kaj fine ankoraŭ Wells, kiu diris, ke ni ne akceptu la mondon, kia ĝi estas, sed ni klopodu ŝanĝi ĝin. Disdialektiĝo ne okazos en mondo, kie amaskomunikiloj pli kaj pli proksimigas la homojn.

En la fino ankaŭ la sportisma malvenkinto, profesoro Honey, ricevis malavaran aplaŭdon. (Dario Besseghini.)

# Infanoj vizitas nin



Fama esperantisto-violonisto Sara Su Jones (Usono) renkontas anojn de la infankongreseto dum ilia vizito al la UK hieraŭ.

# Wells ĉe Kimra Radio

Hieraŭ matene John Wells intervjuiĝis pri la kongreso ĉe la radio: en la kimra lingvo. Intervjuisto Hywel Gwynfryn parolis telefone kun profesoro Wells dum 5 minutoj, kaj la konversacion vive elsendis Radio Cymru.

# OOMOTO EN FILMO

Pli ol 150 kongresanoj sukcesis trovi salonon Baghy lundon matene por partopreni en la fakkunsido de Oomoto. Krom la jam tradicia prezento de diversaj japanaj artoj, oni aŭskultis gastparoladon de s-ro Michael Lamb (Britio) kaj spektis la filmon "Granda origino" farita pri Oomoto por la pola televido. La filmon enkondukis ĝia reĝisoro Roman Dobrzyński kaj asistanto Teruo Matsumoto.

KULTURA SEMINARIO

Ankoraŭ eblas aliĝi al la septembra trisemajna kultura seminario por esperantistoj, organizata de la Oomoto-Lernejo de Japanaj Tradiciaj Artoj. Interesitoj bonvolu kontakti Takashi Ago (1787), Umeo Matsunaga (1789) aŭ Joel Brozovsky (943).

# KAJTO VIVE!



La nederlanda muzikgrupo KAJTO vive elsendiĝas ĉe la regiona radiostacio, Radio Sussex

# Wandel parolas antaŭ urbaj astronomoj

Lundon vespere laŭ iniciato de Edward Griffiths kongresanoj gastis ĉe la Astronomia Societo de Brajtono, kie d-ro Amri Wandel kompetente interpretis la anglajn fakajn prelegojn kaj mem parolis (dulingve) pri la plej lastaj astronomiaj novaĵoj.

# Filologoj aŭdas du prelegojn

Pli ol 40 personoj ĉeestis la kunvenon de Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Filologoj hieraŭ. Violin Oljanov, prezidanto de IUEF, prelegis je la temo "Diferencigo de la sensoj en Esperanto", kaj kunprelegetis Aleksandro Ŝljafer je la temo "Tradicia gramatika priskribo de lingvo vide de ekzaktaj sciencoj". Ambaŭ provokis viglan diskuton.

# Ekzamenaj rezultoj

En la elementa ekzameno de UEA/ILEI sukcesis ĉiuj 5 kandidatoj, kun notoj, kiuj gamis inter "sufiĉe" kaj "bone": Dominique Couturier, Francio; Kaisa Hansen, Svedio; Agneta Emanuelsson, Svedio; Robert Burnay, Belgio; Inger Sjöberg, Svedio.

Ĉiuj 4 kandidatoj en la meza ekzameno same sukcesis: tri per noto "bone" kaj unu per "tre bone": Joy Davies, Irlando; Arnoldo Victor, Usono; Cicero Soares, Brazilo; Maria Antoinetta Massidda, Italio.

Gratulon al ĉiuj!

# Koszmaluk laŭdas patronojn

Ĵaŭdon posttagmeze la estraro de TEJO akceptis ĉirkaŭ 20 TEJO-patronojn per anglaj teo kaj kukoj. La patronoj vigle diskutis kun la estraro kaj ĉeestantaj junaj aktivuloj, ofte proponante valorajn konsilojn por la estonta agado. La patronoj estas grandaj subtenantoj de la junulara sekcio. Ili klare montris hieraŭ ne nur pretecon apogi al TEJO finance, sed ankaŭ profundan interesiĝon pri ĝia laboro. (Jan Koszmaluk, prezidanto de TEJO.)

# Ebura Bordo kaj Pakistano aliĝas al UEA

UEA havas du novajn landajn asociojn: Eburborda Esperanto-Asocio kaj Pakistana Esperanto-Asocio. Ni ĝojas, ke per tio UEA fariĝis ankoraŭ iomete malpli eŭrocentrisma, kaj bonvenigas ambaŭ asociojn en niajn rondojn!

# Nova rolo por komputista adresaro

En sia kunsido mardon Esperantista Komputila Klubo konsideris la ideojn de Jürgen Wulff, kunordiganto de la Komputila Rondo (KompRo), pri la estonta agado. Oni konsentis, ke la KompRo-adresaro iam iĝu la bazo de jarlibro de komputila fakasocio de UEA. Tial oni nun alvokas al ĉiuj movadaj komputilistoj, ŝatokupaj kaj profesiaj, membriĝi en KompRo. Aliĝiloj haveblas ĉe s-ro Wulff, Papenstr. 5B, D-2000 Hamburg 76, FR Germanio.

# Naturistoj provis specialan plaĝon

Internacia Naturista Organizo Esperantista ne maltrafis la okazon viziti la naturistan plaĝon apud la jaktejo, kie eblas bani sin sen vestaĵoj.

27 interesitoj ĉeestis la jaran kunvenon de INOE lundon, kie Bernice Scott, vicprezidanto, parolis pri la naturistaj eblecoj en Britio kaj precipe pri la fame konata klubejo Springwood.

# Sportistoj petas maratoneton en Havano

12 kongresanoj el 9 landoj informiĝis mardon en la kunveno pri sporto, ke oni intencas tre baldaŭ eldoni en Hungario la Nagy-terminaron pri la diversaj sportaj branĉoj.

Oni diskutis pri la neceso informadi sportistojn pri Esperanto okaze de la olimpikaj ludoj en Barcelono (1992), simile kiel oni jam faris en 1972 (Munkeno), 1976 (Montrealo) kaj 1988 (vintraj olimpikoj, Calgary).

La kunveno ankaŭ proponis al la organizantoj de la 75a UK en Havano, ke okazu tie strata kurado kaj sporta tago, kune kun ebleco gimnastiki en ĉiu tago de la kongreso.

# Tostmajstroj sin prezentas

Multaj kongresanoj demandis sin, kio estas "tostmajstro" (angle, toastmaster). Do en lundo la Esperanto-Tostmajstra Klubo de San-Francisko montris al 19 interesitoj el 10 landoj ekzemplon de tipa tostmajstra kunveno.

Tostmajstroj celas prepari sin en amike kritika etoso por paroladoj poste farotaj al la publiko. Minerva Massen provprezentis sian paroladon destinitan por la Tago de la Paco; kaj la kunveno aŭdis ateston de unu ano, kiu post 10 jaroj da ĉiamakomencanteco, finfine paroligis sin per la tostmajstra trejnometodo.

# Eta Princo sur scenejo



Barbara Lukaszewska drame prezentis dufoje "La Etan Princon" de St. Exupery sur la scenejo de salono Brownlee.

# **Internacia Alianco rekonas**

La 5a Konferenco de Internacia Kooperativa Esperanto-Organizo kun partopreno el 15 landoj aŭdis pri kooperativaj spertoj en FR Germanio, Sovetunio, Belgio, Hungario, Pollando kaj Bulgario. Ke Internacia Kooperativa Alianco (IKA) alte taksas la agadon de esperantistoj-kooperativanoj montras ĝia oficiala estrarana saluto al la Konferenco. IKA, la plej granda neregistara organizo kunlaboranta kun UN, havas 600 milionojn da membroj tra la mondo.
(Imre Szabó.)

# *Ni pensas metafore*

Albert Goodheir prelegis hieraŭ en la kunveno de Filozofia Asocio Tutmonda pri la temo "Ni pensas metafore". La uzo de metaforoj ne estas nur lingva fenomeno. Ni pensas per simboloj, kaj ĉiu vorto havas signifon ne en izolo sed kiel parto de tutaĵo. Ne ĉiuj pensmodeloj estas universalaj kaj do tradukeblaj.

# Duonposttagmezo de la lernejo

La dimensiegoj de salono Zamenhof nanigis la proksimume 60 partoprenantojn de tiu mallongigita "Tago de la Lernejo".

Enkonduke prezentis la temon Motivado Stefan MacGill. Sekvis deko da petitaj intervenoj plus demandoj kaj komentoj el la publiko. Oni aŭdis pri ŝanĝoj en la studoprogramoj en Hungario, Britio kaj Francio. Precipe en Britio la reformoj starigas obstaklojn al la instruado de Esperanto, dum en Hungario la maldevigo de la rusa lingvo malfermas perspektivojn.

El la vidpunkto de motivado, restas nerespondita tamen la demando, ĉu oficialigo de Esperanto en la lernejo estas nepre pozitivaĵo; kaj, se ne, kiel eviti ĝiajn malfavorajn aspektojn.

# TEC emas al Infoterm

30 personoj partoprenis la 3an Konferencon de Terminologia Esperanto-Centro, kiu okazis lundon sub gvido de d-ro Detlev Blanke. Oni raportis pri la Terminologia Seminario ĵus okazinta en Poprad, Ĉeĥoslovakio; kaj evidentiĝis, ke TEC povas sin ligi al la monda terminobanko Infoterm en Vieno.

# **Ekzamena libreto furoras**

9 kandidatoj submetiĝis ĵaŭdon al la novstilaj ekzamenoj de UEA/ILEI, 5 je elementa kaj 4 je meza niveloj. La rezultojn oni anoncos kaj diplomojn disdonos antaŭ la fino de la kongreso.

La klariga libreto iĝis furoraĵo: la 100 ekzempleroj portitaj al Britio por la UK kaj la ILEI-Konferenco forvendiĝis en la unuaj 3 tagoj. Kiuj maltrafis, tiuj povos aĉeti ĉe UEA kontraŭ 6,60 nederlandaj guldenoj aŭ, se "soclandanoj", ĉe Hungara Esperanto-Asocio kontraŭ 60 hungaraj forintoj.

Dum la antaŭa jaro ĉirkaŭ 25 kandidatoj sukcesis en la ekzamenoj okazintaj en La Chaux-de-Fonds, San-Francisko kaj la junulara kongreso en Kerkrade.

# Simpla sed profunda

La programo invitis nin ĉeesti prezentadon de simpla poezio. La invititoj estis "simplaj esp-antistoj", ne literaturaj. Tiu modesta anonco, tamen, kaŝis unu el la gemoj de ĉi tiu kongreso. En la brila prezentado de Eric McCanlis, la po-emoj trovis novan vivon, por kapti niajn koron kaj animon. De ploro al ridoj, de meditemo al ribelo - la mondo de la poetoj malfermiĝis antaŭ ni.

Ĉiu ero menciindas; tamen el-staris la jenaj prezentoj:

"Al la juda foririnto" (Lodew-ijk Cornelius Deij) estis pre-skaŭ neeltenebIe kortuŝa, dum ni aŭskultis kaj spertis la kulposenton de la kristano, kiu ne intervenis, kiam la nazioj forportis la judajn najbarojn.

Dum "Kontrastoj" (Brian Price Heywood) ni voluptis mezvintre en varma bankuvo.

Kun Ronsard ("Ni vidu, kara", trad. Kalocsay) mi volis viv-egi, dum ankoraŭ eblas.

Mi ridis ĝislarme kaj ventro-kreve, dum ni aŭdis kaj spek-tis la klopodojn de malsata pasaĝero manĝi en "Vagonrest-oracio" (Raymond Schwartz).

Per "Miaj kantoj" (Sandor Pet-ofi, trad. Kalocsay) Eric mon-tris la tutan gamon de poezia inspiro ekde la plej leĝeraj sentoj ĝis fortega indigno.

En la fino la prezentinto in-stigis nin aplaŭdi ne lin sed la poetojn. Poetoj tamen tre bezonas interpretistojn, kiuj havas tian grandan simpation al la poezio. Ĉi tiu danka aŭskultinto do aplaŭdas ankaŭ vin, Eric.

(Krys Ungar.)

# Por Postkongresontoj

La aŭtobusoj al la postkongre-saj ekskursoj ekveturos post-tagmeze en sabato je la jenaj horoj:

| | |
|---|---|
| Al Kimrio | 13.00 |
| Al Skotlando | 14.00 |
| Al Irlando | 14.50 |

Bonvolu enbusiĝi akurate antaŭ la kongresejo.

# Kiel atingi la ILEI-kongreson

La ILEI-Konferenco okazos tuj post la UK de la 5a ĝis la 8a de aŭgusto en Caerleon, suda Kimrio. Aŭtobuso ekveturos de la kongresejo sabaton je 14.00. Pro kelkaj nuligoj nun restas ankoraŭ iom da liberaj lokoj en la Konfer-enco. Kotizo: 165 pundoj. Se vi interesiĝas, kontaktu Arnold Pitt (1435).

# ESPEUROP




Tiu ĉi aŭtomobila gluetikedo estas eldonita de Espeurop (100 belgaj frankoj por 5). La celo estas donaci ĝin al amikoj, kune kun speciala flugfolio pri Esperanto kaj mendilo por pliaj etikedoj. Tiel, se viaj amikoj opinios la ideon bona, ankaŭ ili povos aĉeti por pludonaci al siaj amikoj. Informiĝu ĉe Angelos Tsirimokos (646) aŭ Michael Cwik (2099), aŭ skribu al Espeurop, Van Elewijck 25, B-1810 Wemmel, Belgio.

# Esperanto kiel integrilo de EEK

Ĉirkaŭ 60 personoj ĉeestis al-menaŭ unu el la du kunsidoj pri la projekto "Komunikado en la Eŭropa Komunumo", kiujn gvidis Edward Symoens kaj Hans Erasmus. La projekto celas plifaciligi la ekuzon de Esp-eranto kiel integrigilo en la Eŭropa Komunumo. Emfazo de la propedeŭtika valoro de Esp-eranto tre bone kadriĝas en la programo "Lingua" ĵus lanĉita de la Komunumo, kiu celas ler-nigi al ĉiu eŭropano 2 lingv-ojn krom la propra.

Montriĝis granda bezono pli bone konigi la jam okazintajn eksperimentojn kun junaj inf-anoj, kie Esperanto funkciis kiel pontolingvo en la fremd-lingva instruado. Bone doku-mentita broŝuro en ĉiuj eŭro-paj lingvoj kaj Esperanto pov-us motivi la EK-komisionon ri-peti tiajn eksperimentojn.

7 laborgrupoj stariĝis. El la plej gravaj, tiu sub s-ro Sym-oens kolektos ĉiujn informojn rilate al eksperimentoj por testi la propedeŭtikan valoron de Esperanto, dum tiu sub s-roj Erasmus kaj Cwik prilab-oros kontaktojn kun la komun-umaj kaj naciaj instancoj.

(Redakcia noto: En ĉi tiu rap-orto oni uzis "Eŭropon" kiel malpli longan sinonimon de la Eŭropa Komunumo. Tiu lingvo-uzo oftas sed povas konfuzi ŝtatanojn el landoj, kiuj ne apartenas al EEK.)

# LA KORTEGA CIRKULERO

de la 74a Universala Kongreso de Esperanto, Brajtono, Anglujo. 1989

Sabaton, la 5an de aŭgusto

**No 6**


## Premiita poemo premieras

Tiu ĉi verko de Krys Ungar (Britio) gajnis unuan lokon en la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj, branĉo poezio.

### *Balonoj*

Flamoj. Muĝo draka. Ŝnurostreĉo.
La korboj tremas ekscite.
Subite
Balonoj en bunta arpeĝo
Trovas liberon,
Forlasas la teron.

Lanta leviĝo pro varma elspiro
De l' drako enboteligita.
Homoj ĉe sia hastado termita
Paŭzas; trembrilas sopiro
En lacaj okuloj, deziro forfuĝi
Haladzojn kaj bruon, ĉielen rifuĝi.

Baldaŭ la turoj betonaj nur pingle
Pikas tra l' lila distanco.
Invitas al danco
Venteto petola, kaj svinge
Fokstroton aeran instigas;
Per fajfo frivola la korojn gajigas.

Tra l' bluaj paŝtejoj de l' nuboŝafaroj
La ventorajdantoj vagas silente
Al celo necerta. Sub ili arĝente
Fadenas rivero; jen urboj, jen valoj,
Jen kampoj flikitaj per grizo asfalta
Soleco. Alto ekzalta.

La vento enuas, forlasas la ludon.
La draka spirpovo jam feblas:
Descendi neeviteblas
Ĉar tenas Gravito la finan atuton.
Kaj korboskue,
    Korposkue,
        Koroskue
Realo revenas,
Ĉagrenas.



Lumspektakla laŭtego: la merkreda junulara rokkoncerto pulsas tra salono Zamenhof

## TEJO apelacias al Ĉina registraro

Okaze de la lastatempa monda junulara festivalo en Pjonjango, TEJO aliĝis al la jena apelacio, kiu trovis ne malgrandan subtenon.

"Libereco je esprimado de politikaj opinioj estas nefordonebla parto de la homaj rajtoj. Ĝi devus esti ankaŭ unu el la esencaj principoj de la festivala movado. Tial ni, la partoprenantoj en la 13a Monda Festivalo de Junularo kaj Studentoj, estas ŝokitaj pri la uzo de perforto kontraŭ niaj gefratoj en Popola Respubliko Ĉinio. La paŝoj entreprenitaj de la ĉina registaro por haltigi pacajn manifestaciojn ne estas pravigeblaj.

Ni apelacias al la ĉina registaro respekti la liberecon de esprimado, kaj ĉesigi la daŭrajn arestojn kaj ekzekutojn."


## SUBTENU LA JUNULOJN

Fariĝu patrono de TEJO. Pagante trioblon de MJ-kotizo, vi ne nur apogas la junularan agadon sed ankaŭ ricevas la gazetojn Kontakto kaj TEJO tutmonde kaj ĝuas akcepton okaze de ĉiu Universala Kongreso.

# Akademio defendas landnoman liston

En sia fermita kunsido deko da membroj de la Akademio de Esperanto okupiĝis pri organizaj demandoj, interalie la starigo de la sekcioj post la ĵusaj elektoj. Krome, diversaj voĉdonadoj en la lasta tempo kaŭzis novajn lingvajn diskutojn, eĉ disputojn.

La publika kunveno de la Akademio arigis proksimume 200 interesitojn. Kiel en antaŭaj UKoj oni respondis al demandoj el la publiko. Gvidis Werner Bormann, vicprezidanto de la Akademio.

Pri la ĉirkaŭ 25 temoj levitaj dum la kunveno diversaj akademianoj esprimis sian opinion. La gamo estis vasta. Neologismoj, unuopaj kaj la ĝenerala fenomeno, estis diskutataj; ankaŭ la gravo aŭ negravo de la Skoloj Analiza kaj Iltisa. Kritikon kontraŭ la tradicia konsisto de la Akademio montris la demando pri la rareco de virinoj kaj neblankuloj inter ĝiaj anoj. Aldoniĝis la sufikso -in: ĉu Esperanto estas lingvo seksisma?

Pluraj kontraŭstaris la liston de landonomoj, pri kiu la Akademio ĵus decidis post sesjara korespondado. Evidentiĝis kiel problemkazoj Ukrain(i)o, (Nov-)Zelando kaj Kore(uj)o. El la flanko de la akademianoj venis la argumento, ke decidoj de plimulto similas verdikton de tribunalo. Venkitoj kritikas sed la decidoj tamen validas kaj estas sekvendaj. Aliaj akademianoj atentigis pri la ĉiam nur dumtempa valideco de normoj: ili koncedis, ke la fortaj protestoj pri iuj nomoj montras la netotalan elĉerpon de la tuta vasteco da argumentoj, kio certe instigos daŭrigon de la esploroj.

(Werner Bormann.)

# NOVAJ ALIĜOJ

2243 PRIPŜTEIN, S-ino Anna, POB 438, Givat Tees 90917, Israelo
2244 ZOZULJA, S-ro Boris, SU-344007 Rostov-Don, a/k 443, Soveta Unio
2245 ZOZULJA, S-ro Ruslan, sama adreso
2246 ZOZULJA, S-ino Nina, sama adreso
2247 FUJITA, S-ro Yoshihisa, 105-32 Minesawa-cho, Hodagaya-ku, Yokohama, Japanujo
2248 CAMARGO SOUTO, S-ro Rita Suzana, Au Venancio Aires 177, HP 301, Porto Allegre RS, CEP 90040, Brazilo
2249 MAKSIMOVA, S-ino Jelena I., 400006 Volgagrad, Foludeva 14-61, Soveta Unio
2250 THOMPSON, S-ro Stephen K., Garth View, Bolton Appleby, Cumbria, Britujo CA16 6AL
2251 KARPUNINA LENA, S-ino Ilena, Taĝikio, u. Duŝanbe, st. Tunis 3-69, Soveta Unio
2252 STEELE, S-ro John, 2101 East Washington, Harlingen, Texas, Usono
2253 PHILIPP, S-ro Walter, 2 The Green, Palmerston Road, Buckhurst Hill, Essex, Britujo
2254 KOVTONJUK, S-ro Evgeno N., Ab. Kesto 165, Kiev-1, SU-252001 Soveta Unio
2255 FRANK, S-ino Ines U., Kleinenberger Weg 16, D-4790 Paderborn, FR Germanujo
2256 ZAHARIEV, S-ro Aleksandro, st. "Nikola Botuŝev" 15-B, Sofio, Bulgarujo 1505
2257 RICKETTS, S-ro Rodney, 57 Kingfisher Ave., Hythe, Kent, Britujo CT21 6QT
2258 GROMOV, S-ro Vladimir, 194291 Leningrad, str. Santiago de Cuba 2-1-55, Soveta Unio
2259 RUBIÓ I AMORÓS, S-ro Dani, c/. Castellar 140, 4-4 i, E-08208 Sabadell (Barcelona), Katalunujo, Hispanujo
2260 SEDÓVA, S-ino Irena, 194021 Leningrad, pr. M. Toreza 13-4, Soveta Unio
2261 DE VRIES, S-ro Dirk K., Deken v. Somerenstraat 21-B, 5611 KX Eindhoven Nederlando
2262 SZANSER, S-ro M., 00185 Warszawa, Zabinskiego 14 m 3, Pollando
2263 ANTITILA, S-ino Heidi, Aiulu 6-8A26, 40450 Jyväskylä, Finnlando

2263 ANTTILA, S-ino Heidi, Aiulu 6-8A26, 40450 Jyvaskyla, Finnlando
2264 NAVARACKAITE, S-ino Gintvile, 232043 Vilnius, Erfurto 50-58, Litovujo Soveta Unio
2265 LINNAMÄGI, S-ro Madis, Tahe 85-4, Tartu, Estonujo 202400, Soveta Unio
2266 KAVANAGH, S-ro Michael T., 41 Worcester St., Barrow-in-Furness, Cumbria, Britujo LA13 9RU
2267 TACK, S-ino Gloria, 35 Darwin Road, Southampton, Britujo
2268 MISSEN, S-ino Catherine, 35 Sherwood Avenue, Hedge End, Southampton, Britujo

# Nia Unua Gazeto: telekopie




En 1889 ekaperis nia unua gazeto. La 1an de septembro ĉijare, precize 100 jarojn poste, vi povos utiligi tiun datrevenon por atentigi la publikon pri Esperanto.

Vi povos aranĝi gazetaran konferencon aŭ alian publikan kunvenon en tiu tago okaze de la jubileo kaj ricevi dum la kunveno kopion de la unua numero de La Esperantisto rekte el ĝia siatempa eldonurbo Nurnbergo. Por tio vi bezonos salonon kun telekopiilo (aŭ vi uzu telekopiilon en proksima poŝtoficejo). Kaj, se vi loĝas en transpagipova lando, ni petas 10 usonajn dolarojn pro la sendokostoj.

Por detaloj rigardu la afiŝojn aŭ kontaktu la UEA-respondeculon pri la afero, Lu Wunsch-Rolshoven (1512).

# MORMONOJ INFORMAS

Ĵaŭdon matene okazis kunveno pri la Eklezio de Jesuo Kristo de la Lastatagaj Sanktuloj (la Mormonoj). Oni klarigis al la ĉeestantoj el 15 landoj la bazajn konceptojn de tiu religio, kaj disponigis en Esperanto diversajn informilojn.

# Jura Asocio refondita

En la jurista kunveno lundon refondiĝis la faka Esperanto-asocio pri juro. Laŭ mandato donita en la pasintjara kunveno en Rotterdam Ian Jackson prezentis proponon de fonda akto, kiun oni aprobis post detala diskuto. Provizore la nova asocio nomiĝas same kiel ĝia antaŭulo: Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ).

La antaŭa IEAJ malfondiĝis post la morto de ĝia delonga prezidanto, profesoro Lapenna, sed la nova asocio jam havas la sukcesodezirojn de d-ro Klaus Perko, sekretario-kasisto de la antaŭa IEAJ, kaj la subtenon de Tom Arbo Hoeg, kiu redaktis dum multaj jaroj Internacian Juran Revuon.

La intenco estas havigi eĉ pli vastan apogon, kaj la fonda akto do restos malfermita por subskribado ĝis la fino de la jaro. La provizora gvidantaro (John Dale, Rainer Heckhausen, Ian Jackson, Paŭlo Jegorovas kaj Rafaela Urueña de Hernandez) estas taskita poste esplori inter la fondintoj, ĉu oni devus alpreni alian nomon por la asocio, kaj prezenti proponon de statuto.

La teksto de la fonda akto aperas ĉi-sube. Ĉiuj movadaj respondeculoj estas petataj informi pri ĝi en la propra lando.

INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE JURISTOJ: FONDA AKTO

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj fondiĝis okaze de la 42a Universala Kongreso en Marseille en la jaro 1957. Oni dissolvis ĝin je 31 decembro 1987. Konvinkite, ke internacia Esperanto-asocio de juristoj ankoraŭ estas nepre bezonata, la subskribintoj de tiu ĉi akto deklaras sian interkonsenton fondi novan asocion (la "Asocio") ekde 31 julio 1989 laŭ la ĉi-sekvaj preskriboj.

1. Nomo

La Asocio provizore nomiĝas Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj.

2. Celoj

La celoj de la Asocio estas (a) informi en juristaj medioj pri la internacia lingvo Esperanto, (b) praktike utiligi Esperanton sur ĉiuj kampoj de la juro kaj (c) jurafake kontribui en la edukado al tutmonda konscio.

3. Neŭtraleco

La Asocio estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko kaj sociaj problemoj, kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj.

4. Esencaj kondiĉoj

Bonaj internaciaj rilatoj kaj respekto de la homaj rajtoj estas por la agado de la Asocio esencaj kondiĉoj.

5. Lingvo

La sola oficiala lingvo de la Asocio estas la internacia lingvo Esperanto.

6. Internacia revuo pri juro

La Asocio eldonas internacian revuon pri juro.

7. Membroj

La subskribintoj de tiu ĉi deklaro, estante diplomitoj pri juro aŭ studantoj por tia diplomo, fariĝas membroj de la Asocio. Tiuj, kiuj subskribos ĝis 31 decembro 1989, estos konsiderataj kiel kunfondintoj de la Asocio.

8. Provizora gvidantaro

La personoj ĉi-sube specifitaj estas la provizora gvidantaro de la Asocio. Ili oficos ĝis la fino de la venonta jarkunveno.

9. Venonta jarkunveno

La venonta jarkunveno okazos kadre de la 75a Universala Kongreso de Esperanto en La Habana.

10. Statuto

La provizora gvidantaro estas komisiita verki statuton konforman al tiu ĉi akto por alpreno de la membroj en skriba balotado per almenaŭ du trionoj de ĉiuj donitaj voĉoj.

11. Universala Esperanto-Asocio

La Asocio deziras aliĝi al Universala Esperanto-Asocio kiel ties faka asocio pri juro.

Provizora gvidantaro: John Dale (Usono), Rainer Heckhausen (FR Germanio), Ian Jackson (PR Ĉinio), Paŭlo Jegorovas (Sovetunio), Rafaela Urueña de Hernandez (Hispanio).

Tiuj, kiuj deziras subskribi la fondan akton, indiku tion skribe al Ian Jackson, p/a Clifford Chance, 30/F Jardine House, Honkongo, antaŭ la fino de la jaro.

# Radio Polonia

Andrzej Pettyn, reprezentanto de la Esperanto-redakcio de Radio Polonia, transkablis kaj altelefonis al Varsovio multajn informojn pri la kongreso dum la tuta semajno. Samtempe li surbendigis amason da sonscenoj, raportoj kaj intervjuoj kun pli ol 200 gekongresanoj, kiuj estos prezentitaj kadre de la esperantaj elsendoj de Radio Polonia ĉiutage ekde 7 aŭgusto.

Li invitas vin aŭskulti post la reveno hejmen: la horojn kaj frekvencojn de la elsendoj vi trovos interalie en la aprila numero de Esperanto, kies redaktoro, Mark Fettes, parolos el Varsovio la 8an de aŭgusto je 21.30 (universala tempo) interalie per la meza ondo 200m (1505 kHz).

Se vi volas ricevi senpage la novan programinformilon, skribu al Radio Polonia, Esperanto-redakcio, Varsovio, Pollando.

# Informiĝu pri Litovio

Dufoje semajne, kadre de siaj duonhoraj anglalingvaj novaĵbultenoj, Radio Vilnius elsendas 4 minutojn da raportado en Esperanto.

En ĉiu elsendo estas almenaŭ unu sciigo pri la Esperanto-movado en Litovio, kaj vi aŭdos ankaŭ aktualaĵojn pri la litovaj kulturo, socio kaj politika vivo.

REAGU...PROPONU...

Reagu letere, proponante temojn kaj levante demandojn respondeblajn en la elsendoj. Radio, Esperanto, 232674 Vilnius, Litovio, Soveta Unio.

Lunde 22.00-22.30 kaj ĵaŭde 21.30-22.00 (universala tempo), ondolongoj 451m kaj 49m, 666 kHz kaj 6100 kHz.

# Iĝu du-radulo

Ĉi-somere Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI) realigis dubranĉan biciklan karavanon el Zaragoza tra Bretonio kaj (kun helpo de subvencio) el Trondheim tra Svedio kaj Danlando. La granda kuniĝo okazis en Bonn, kaj la 33 biciklantoj el 13 landoj fine atingis Kerkrade por partopreni la Internacian Junularan Kongreson. Poste 10 biciklantoj plu pedalis ĝis Brajtono.

Bicikli signifas esti proksime de la naturo, ŝpari energion kaj konservi la sanon. Oni samtempe renkontadas interesulojn kaj internacia karavano trovas multajn okazojn survoje por informi pri Esperanto.

Aliĝu do al BEMI! Nur 3 pundojn jare.



La urbestro akceptas ekskursantajn kongresanojn en la urbodomo de Lewes, proksime de Brajtono

# 80 personoj en Esperantologia Konferenco

Pli ol 80 personoj sekvis la ĉi-jaran Esperantologian Konferencon, kiun gvidis d-ro Detlev Blanke en ĵaŭda posttagmezo. D-ino Marjorie Boulton prelegis pri Zamenhof kiel kreinto de literaturaj precedencoj. Aleksandro Melnikov prezentis semantikajn problemojn de esperantaj leksemoj. D-ro Erich Dieter Krause komparis la afiksajn sistemojn de la indonezia lingvo kun Esperanto; kaj Detlev Blanke skizis kelkajn proponojn pri la organizado de scienca esploro pri Esperanto je landa nivelo.


# IAdEM eldormiĝas

Post plurjara silento flanke de Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj, tiu fakasocio komencas reviviĝi. En la kunsido ĉi tie en Brajtono elektiĝis nova estraro, kies prezidanto estas profesoro Horst Holdgrün (FR Germanio).

# Redaktolimo

Pro teknikaj kialoj la redaktolimo de ĉi tiu numero estis 10.00 hieraŭ matene. Ne eblis aperigi materialon, kiu atingis la redakcion post tiu horo. Ni tamen transdonos ĉiujn raportojn al Mark Fettes, redaktoro de la revuo Esperanto.

# GAZETARA SERVO



Universala Kongreso estas granda manifestacio direktata ankaŭ al la ekstera publiko. Jen Reg Bedford, Will Green kaj Ian Fantom de la gazetara servo, kiu nutradas la landajn kaj regionajn amaskomunikilojn per konstanta fluo de informoj.

# *La redakcio diras "Ĝis!"*

Jen la lasta numero de La Kortega Cirkulero. Ni faris nian eblon eldoni la plej gravajn informojn kaj la plej interesajn novaĵojn. Foje ni disponis pri spaco por anoncoj kaj artikoletoj. Kelkaj plendis, ke ni aperigis ilin. Aliaj, ke ni ne aperigis sufiĉajn!

## NIA ĈEFA CELO

Ne eblas ĉiam placi al ĉiuj. Nia ĉefa celo estis krei plaĉaspektan diversenhavan bultenon en bela formo, por esti ĵurnalo kaj samtempe memoraĵo de la kongreso. Se vi ĝuis legi ĝin tiom, kiom ni ĝuis ĝin redakti, ni pli ol kontentas!

La redakcio: Ian Jackson (teksto), Peter Oliver kaj Hardo Bourguignon (grafiko), Arĝuno (fotoj). Eldonis LKK. Presis Brighton Print & Finish.